


EL POPOLA

ĈINIO

中國報道

7 · 1983





FAMA HISTORIA KULTURA URBO-YANGZHOU

Fotoj de YAN JIN kaj MAO YONGKUAN


Ŝtona pagodo konstruita antaŭ pli
ol 1100 jaroj kaj antikva arbo

Fiŝhoka Kiosko en matena nebulo sur digo de la lago Shouxi





En la antikva domo Yueguan





La nova Yangzhou



La templo Daming konstruita antaŭ pli ol 1 500 jaroj


Memorhalo de bonzo Jianzhen

Fotoj de **LI CHUNGENG**




Bela kaj eleganta jadskulptaĵo estas unu el la famaj metiartaĵoj de Yangzhou.

Foto de **WANG HONGJUN**



Sunleviĝo ĉe la Lotusa Ponto de la lago Shouxi



La pagodo Wenfeng surborde de la Granda Kanalo

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Zhang Haidi

Foto de Lao Bai

SUR LA DORSKOVRILO:

Oferajoj

Pentrita de Zhang Xinying

KOLORAJ SERIOJ:

Fama historia kultura urbo —
Yangzhou

Pejzaĝoj de Xianning

Fotoj faritaj de esp-istoj

Kokajaj kuboj kun ternuksaj graj-
noj

Ŝanĝiĝo ĉe la ponto Gongchen

Modestaj kaj Denskoloraj pentra-
joj de kamparanoj de Jinshan

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Zhang Haidi

Plezuro de emeritaj laboristoj

Strataj biciklaj garaĝoj en Pekino

Enhavo

Pri la angla lingvo kaj lingva hegemonio	2
ĈINAJ EMINENTULOJ KAJ ESPERANTO: Ĉina esperan- tisto-tradukisto Sun Yong	4
Hungario invitas vin	6
POR KOMENCANTOJ: Mia naskiĝotago	12
ESP-NOVAĴOJ	9
Ŝi kortuŝas gejunulojn	15
La celo kaj paŝoj de ĉina ekonomia disvolvo	19
Por akiri pli da proteino	27
KURANTAJ AFEROJ	13
Naturparkoj de Ĉinio	30
Pentraĵoj de kamparanoj de Jinshan	32
Du fabloj	48
MIA VIVO: Kiel mi fariĝis volana stelo	35
VIDINDAJ LOKOJ: La pitoreska regiono Xianning	25
Vojaĝo laŭ la Granda Kanalo (7): Finiĝo de mia vojaĝo	50
HISTORIAJ URBOJ: Yangzhou	23
5 000 JAROJ DE ĈINIO: En la periodo de la Orienta Jin- dinastio	40
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La administra divido de Ĉinio	37
La standardo de nacia sendependeco kaj liberiĝo de Sud- Ameriko	46
TRA LA MONDO	49
ĈINAJ PLADOJ	27
INTER NI	43
KORESPONDI DEZIRAS	11

JARABONTARIFO	Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugallio	Esc.	400		
Aŭstralio	\$A	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZ\$	6.70	Usono	US\$	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$	7.20

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00

PRI LA ANGLA LINGVO KAJ LINGVA HEGEMONIO

de ZHANG QICHENG



La aŭtoro

EN sia artikolo “Impresoj de du vizitetoj en Beijing” (EPC 4/1983), D-ro. H. G. Frank skribis pri la vasta aplikado de la angla lingvo en Ĉinio sur scienca kaj turisma terenoj, kaj akre plendis, ke “kvazaŭ ekster Ĉinio ekzistus nur anglalingva scienco” kaj ke “kvazaŭ alilingvaj turistoj ne estus bonvenaj”. Pri tio la redakcio de la revuo faris jenan klarigon: “Tion kaŭzas la fakto, ke en Ĉinio oni ĝenerale prenas la anglan por internacia komuna lingvo.”

Fakte, ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en multaj aliaj aziaj landoj, kaj supozeble en aro da afrikaj, oceaniaj kaj eĉ eŭropaj landoj, la angla lingvo estas vaste uzata por internacia komunikado en politika, ekonomia, kultura kaj aliaj kampoj. Ekzemple, sur la emblemo de la Naŭa Azia Sportkunveno, krom la hindia lingvo, oni aldonas la anglan, kaj dum la Estrara Konferenco de Nealiancaj Landoj okazigita antaŭ ne longe en Hindio, ankaŭ multaj ĉeestantoj parolis angle. Similajn ekzemplojn oni povas citi multnombre.

Azianoj kunvenantaj plejparte el diversaj ekskoloniaj landoj uzas la lingvon de la iama imperiisma potenco kiel komunan lingvon, kaj la nealiancaj landoj, kies ĉefa celo estas liberiĝi de la influoj de grandaj potencoj, uzas la lingvon de superpotenco por sia celo. Tio vere estas granda ironio por tiuj popoloj, kiuj batalis kaj batalas por libereco, egaleco kaj sendependeco. Kaj por ni esperantistoj, tio estas des pli okulfrapa malagrablo. Mi ankoraŭ freŝe memoras, ke Gesinjoroj Woesink, vizitante nian ĉefurbon en la jaro 1975, insiste proponis, ke la anglalingva skribajo “Niaj amikoj troviĝas tra la tuta mondo” sur la tabulo en la vestiblo de la Pekina Hotelo estu anstataŭita per la Esperanta. Simple laŭ la esperantista vidpunkto, tiu ĉi propono sendube estas ĝusta, tamen taksate laŭ la realo, ĝi estas ne realigebla.

La realo estas: kvankam la mondo pli kaj pli malgrandiĝas dank’ al la rapida evoluado de scienco kaj tekniko, la interrilatoj inter diversaj popoloj pli kaj pli intimiĝas kaj la bezono de internacia komunikilo fariĝas pli

kaj pli urĝa, tamen ĝis nun ankoraŭ mankas al la homaro iu oficiale agnoskita internacia lingvo. Sekve oni vole nevole devas preni unu el la naciaj lingvoj kiel lingvon por internacia komunikado. Krome, ni devas rimarki la historian faktoron, kiu influis la mondon en la periodo de pli ol cent jaroj. De la komenco de la 19-a jarcento ĝis la eksplodo de la Dua Mondmilito, dank’ al la senĉesa plipotenciĝo de la granda brita imperio, la disvastiĝo de la angla lingvo ĉiam pliiĝis. Kaj post la milito, la superpotenciĝo de Usono plue fortigis la pozicion de tiu lingvo.

Aliflanke, la realo estas: kvankam Esperanto estas la ideala lingvo por esti uzata internaci-skale, tamen ĝis nun ĝia disvastigiteco ankoraŭ restas trege limigita, oni ankoraŭ ne povas ĝin vaste apliki en la praktika vivo por komerca, turisma, scienca, kultura kaj aliaj celoj. S-ro Tibor Sekelj, en sia prelego farita en la antverpena Kongresa Universitato, parolis ke li decidis ne aldoni Esperantan klarigon al la ekspoziciaĵoj en la mu-

zeo mastrumata de li mem, ĉar li konsideris, ke malmultaj vizitantoj legas Esperante. Tio signifas, ke S-ro Sekelj, malgraŭ sia esperantista entuziasmo, devis fari tiun decidon por konformi al la realo. Unuvorte, la praktika utileco de Esperanto, en sia nuna kondiĉo, ankoraŭ ne plene adaptiĝas al la homa bezono.

Konsekvence de tiu realo estiĝas la fakto: granda nombro da personoj en Ĉinio kaj aliaj mondpartoj konsideras, ke la angla estante la plej vaste uzata lingvo en diversaj partoj de la mondo, nepre estas la plej kompetenta por ludi la rolon de internacia komunikilo. Do, ili uzas la anglan ne simple kiel la lingvon de la anglosaksanoj, sed kiel ĝenerale akceptatan komunan lingvon por ĉiuj popoloj. Tiusence, por ili, la angla havas duoblan rolon, tiun de nacia lingvo kaj samtempe tiun de internacia komunikilo. Por ili, la uzado de la angla lingvo en internacia sfero estas tute natura kaj ne kritikinda. Kaj ili tute ne konscias, ke tio fakte signifas iasence subteni la lingvan hegemonion aŭ toleri la lingvan diskriminacion. Iu el miaj konatuloj, S-ro Liu, la ĉefredaktoro de CHINA DAILY, la unika angla-lingva ĵurnalo en Ĉinio, aŭskultinte mian prelegon "Esperanto kaj la Tria Mondo" dum la Dua Kongreso de Pekina Esperanto-Asocio, diris al mi, ke la termino "lingva hegemonio" sonas por li tute freŝe, ĉar li ja la unuan fojon aŭdis pri tio. Tiu sinjoro estas membro de la ĉina organizo "Amikoj de Esperanto" kaj multe simpatias al nia afero. Sendube li apartenas al la tavolo de elstaraj intelektuloj, tamen eĉ tia elito de nia lando kia li restas neinformita pri la problemo de lingva hegemonio.

Jam en la jaro 1927, S-ro Hujuc, pioniro de la ĉina Esperanto-movado, verkis broŝuron titolitan "Kvardek jaroj de Esperanto", en kiu li refutis la opinion, ke nur potencaj naciaj lingvoj taŭgas por fariĝi internacia lingvo, li elokvente argumentis, ke tio certe alportos avantaĝon al la potencaj ŝtatoj kaj malprofiton al la malfortaj. Pli ol duona jarcento forpasis, tamen la problemo restas nesolvita por multaj homoj.

El la supraj faktoj kaj analizoj, ni povus verŝajne veni al jenaj konkludoj:

1) Ni devas multoble pli energie labori por la disvastigo kaj precipe por la aplikigo de Esperanto en diversaj sferoj de homa vivo, ĉar homoj ĝenerale lernas lingvon ĉefe por praktikaj celoj, kaj malmultaj emas lerni lingvon nur por ia idealo aŭ ia estonta espero. Nur se Esperanto posedos grandskale praktikan valoron por la publiko, ĝi fari-

ĝos lingvo bezonata kaj sekve uzata de la vastaj amasoj.

2) Paralele kun la supra agado, ni devas foje kaj refoje propagandi por lingva egaleco inter ĉiuj popoloj kaj kontraŭ lingva hegemonio, emfazante la danĝeron de tiu hegemonio al la malfortaj landoj, precipe al la popoloj de la tria mondo. Ni devas konvinki la publikon ke, ĝuste pro tio ke la angla estas potenca lingvo, ĝi neeviteble kunportas la hegemonian influon kaj sekve ne taŭgas por ludi la rolon de internacia lingvo malgraŭ sia disvastigiteco, kaj Esperanto kiel lingvo neŭtrala kaj egala por ĉiuj popoloj, estas multoble pli kvalifikita por tiu rolo malgraŭ sia nuna malforteco. Ju pli multe da homoj konscias pri tio, des pli favoraj estos la kondiĉoj por la prosperiĝo de nia afero.

Nur tiamaniere, mi pensas, ni povas antaŭenpuŝi nian lingvon al la brila celo de universaleco.

Zhang Qicheng (dekstre) kun brazila esperantisteto



ĈINA ESPERANTISTO- SUN YONG



Sun Yong

dento, kaj ankaŭ Sun Yong serĉu alian vojon por peti hungaran esperantiston aĉeti tian broŝuron. Ricevinte la leteron, Sun Yong tuj skribis al d-ro K. Kalocsay, la esperantiginto de la epopeo, por peti lian helpon. Nelonge poste, la fervora Kalocsay sendis al li 12 ilustritajn poŝtkartojn pri la epopeo.

Ĉio estis en ordo, tamen Lusin trovis neniun, kiu volas eldoni ĝin, ĉar Sun Yong tiam ne estis fame konata kaj oni konsideris ĉion laŭ vidpunkto, ĉu oni profitos aŭ ne. En sia letero al Sun Yong Lusin skribis kun ĉagreno: "Eldonejoj ĉasas nur profiton, kio kaŭzos, ke al Ĉinio mankos bonaj libroj." Por prezenti al ĉinoj famajn literaturaĵojn de la mondo kaj helpi ĉinajn junajn esperantistojn elhaki vojon en veprejo, Lusin klopodis unu kaj duonan jarojn kaj finfine trovis librejon, kiu akceptis la eldonadon. Mankis al la librejo kapitalo, Lusin do antaŭpagis monon por platofarado kaj honorarion al la tradukinto, persone korektis la presprovajojn, elektis ilustraĵojn, faris paĝaranĝon kaj verkis postskribon por la libro. Post la apero de la libro, Lusin skribis al Sun Yong kun plezuro: "La majstra verko de Petofi estas finfine prezentita al Ĉinio." De tiam oni iom post iom konis la nomon de Sun Yong, kaj liaj tradukaĵoj eldoniĝis pli facile.

Liaj tradukaĵoj plaĉis al ĉinaj legantoj kaj ankaŭ altiris la aten-

EN 1931, aperis en Ĉinio la ĉinlingva versio de "Johano la Brava" verkita de la hungara patriota poeto Petofi Sandor. La epopeo tuj plaĉis al ĉinaj junaj progresemaj literaturo-amantoj, kaj ankaŭ la tradukinto Sun Yong ekkoniĝis en Ĉinio.

Sun Yong estas fama ĉina esperantisto, tradukisto kaj membro de la konsilantaro de la Ĉina Tradukista Asocio.

Sun Yong origine nomiĝis Bu Chengzhong. En 1919 li diplomitiĝis en mezlernejo. Post tio li servis kiel leter-klasifikisto de la Hangzhou-a Poŝtoficejo de Zhejiang-provinco. En siaj liberaj horoj li mem lernis la anglan lingvon kaj ankaŭ Esperanton eble en 1926. Li laboris en la poŝtoficejo 23 jarojn kaj instruis poste en mezlernejo kelkajn jarojn. Dume li dediĉis sian libertempon al tradukado de literaturaĵoj kaj poste okupiĝis ekskluzive pri tiu laboro. Li ĉinigiĝis jenajn fremdlandajn Esperantajn literaturaĵojn: "Johano la Brava" (1931), "La Kapitanfilino" (1944), "Bulgara Prozo" (1945), "40 Poemoj de S. Petofi" (1951) kaj aliaj.

Dank' al helpo de la fama ĉina literaturisto Lusin, Sun Yong sukcesis entrepreni Esperantan tradukadon. Lusin siatempe havis grandan influon sur ĉinajn junajn literaturo-amantojn, kaj Sun Yong estis fidela leganto de liaj verkoj. Pro estimo kaj konfido al Lusin, Sun Yong sendis al li, en la komenco de 1929, siajn ses ĉinigitajn Esperantajn poemojn por konsulto. Lusin tuj skribis respondan leteron al tiu nekonata junulo kaj publikigis kvar el ili verkitajn de la rusa poeto Lermontov en la de li redaktita gazeto "Toronto". La subteno de Lusin multe kuraĝigis lin. En septembro de 1929, li sendis al Lusin ankaŭ la epopeon de Petofi "Johano la Brava", kiun li tradukis en la ĉinan lingvon el Esperanto.

Ricevinte la tradukaĵon, Lusin ege ĝojis, ke la aŭtoro estas granda poeto de Hungario kaj la tradukaĵo bona. Li klopodis por eldoni ĝin libroforme. Por ke la legantoj povu legi la libron kun ilustraĵoj, li skribis al Sun Yong, ke li jam petis sian amikon en Germanio aĉeti broŝuron kun ilustraĵoj pere de hungara stu-

TRADUKISTO

de SHAO BIN

ton de ĉinaj junaj esperantistoj. S-ro Tikos, kiu ĝuas nun en Ĉinio grandan reputacion, tiam fondis kune kun siaj kamaradoj por iu ĵurnalo la duonmonatan revuon "Nova Voĉo", kiu koniĝas al legantoj literaturojn de malgrandaj nacioj, ĉinigitajn el Esperanto. Li legis la tradukaĵon de Sun Yong kaj skribis al Lusin por informiĝi pri Sun. Li sendis al Lusin la alian revuon "La Espero" en la ĉina lingvo fonditan de ili por propagandi Esperanton kaj petis lin transdoni ĝin al Sun Yong. Tiel Tikos ekhavis rilaton kun li. Kvankam ili malofte korespondis kaj renkontiĝis, tamen ili ĉiam tenas unu la alian en sia koro. Menciante Sun Yong en sia artikolo, Tikos skribis: "La ĉinaj esperantistoj povas esti dividitaj en tri partojn, el kiuj unu parto sin okupas pri elesperantigado de alilandaj literaturaj verkoj por prezenti ilin al Ĉinio, kaj Sun Yong estas reprezentanta persono ĉi-rilate." Tio

bone taksis la energian kaj senlacan laboradon de Sun Yong dum dekoj da jaroj. Rimarkinde estas, ke fremdlandaj literaturoj tradukitaj de Sun Yong plejparte apartenas al orienta kaj norda Eŭropo. Per sia fruktodona laborado li plenigis mankon de tradukitaj literaturoj en Ĉinio, kio akcelis disvastigon de Esperanto kaj valoraj literaturoj de la mondo. Tial en 1958, kiam li invitive vizitis la patruon de Petofi, la hungara popolo honoris lin per labora ordeno.

Krom entrepreni elesperantigadon, Sun Yong ankaŭ aktive propagandis Esperanton. Li verkis por ĵurnaloj la artikolojn "Mia sperto en lernado de Esperanto", "Kio estas Eeparanto kaj aliaj" kaj "Esperanto min helpas" k.a. Resumante sian sperton, li opinias, ke traduki alilandajn literaturojn pere de Esperanto havas du superecojn: unue, la fleksebleco de Esperanto igis literaturajn tradukaĵojn pli fidelaj al la originaloj kaj pli bone konservi la originan stilon; kaj due, la tradukantoj povas pli facile ricevi helpon de esperantistoj de koncernaj landoj.

Ekde la 50-aj jaroj Sun Yong malmulte faris tradukadon, ĉar

li devis dediĉi sian energion al studo de Lusin kaj prepara laboro por eldoni "Verkojn de Lusin" (plena kolekto). Li estas la unua ĉino, kiu ordigis la verkojn kaj tradukaĵojn de Lusin. Nun Ĉinio havas diversajn novajn eldonojn de verkoj de Lusin, kies plejparto estis ordigita de li.

Sun Yong jam ne plu laboras pro maljuneco kaj malsano. Tamen, kiel eksperto li estas bona mentoro de junaj kaj mezaĝaj literaturistoj. Same kiel Lusin li volonte plenumis la petojn de junuloj. Foje iu havis problemojn pri Esperanto en studo de Lusin, li sin turnis al Sun Yong por konsulto. Ĉi tiu ne nur solvis liajn demandojn, sed ankaŭ prezentis al li la ĝeneralan aspekton de Esperanto.

La maljuna elesperantigisto tamen ne emas babili. Kiam mi demandis lin pri la avantaĝoj kaj perspektivo de Esperanto, li nur singene ridetis: "Mi havas malertan langon." Jes, iuj nur pri-verŝas florojn per sia ŝvito, sed ne estas lertaj en laŭdado de ili dum ilia disvolviĝado. Sun Yong ĝuste estas tia homo silentema, sed laborema kaj fidela al nia movado.

Parto de literaturaj verkoj tradukitaj de Sun Yong el Esperanto



HUNGARIO INVITAS VIN

HUNGARIO situas en meza-orienta Eŭropo, estante kvazaŭ kontakta punkto inter Eŭropa oriento kaj okcidento. La hungara popolo — okupinta tiun teritorion fine de la 9-a jarcento p. K. — havas Aziajn devenon kaj lingvon, sed Eŭropan kulturon. Inter la jaroj 1541 kaj 1699 parto de Hungario estis la plej okcidenta distrikto de la Osmana (Turka) Imperio, alia parto estis sub la regado de la aŭstra imperiestro, dum Transilvanio (nun parto de Rumanio) povis konservi almenaŭ ŝajnan sendependecon. Tiu historia sorto kaŭzis al Hungario multajn damaĝojn, sed ankaŭ faris la hungarojn malfermitaj por plej diversaj kulturaj efikoj. La psika malfermiteco ĝis nun konserviĝis, kaj hungaroj ĉiam tre volonte turnas sian atenton al la aferoj de la mondo. Verŝajne ankaŭ al tio ŝuldiĝas la sukcesoj de la Esperanto-movado en Hungario, kiuj ebligas al la hungaraj esperantistoj okazigi jam triafoje Universalan Kongreson en Budapeŝto, la hungara ĉefurbo.

Budapeŝto konstante gastigas tre gravajn internaciajn kongresojn: pasintjare okazis ĉi tie la Hematologia Mondkongreso kun ĉ. 3 000 partoprenantoj en la Sporthalo "Budapeŝt", kie oka-

zos la 68-a UK. Krom ĝia centra situo en Eŭropo Budapeŝton faras perfekta kongresurbo ankaŭ ĝia turisma allogeco. La urbo, havanta du milionojn da loĝantoj, kuŝas sur ambaŭ bordoj de la rivero Danubo: sur la dekstra bordo estas Buda, sur la

maldekstra Pest. Danubo fakte estas limrivero inter du ĉefaj regionoj de Hungario: la orienta ebenaĵo kaj la varia, montetplena Transdanubio. Buda kaj Pest havas strikte malsaman fizionomion: en Buda abundas montetoj, arbaretoj, dum Pest

Hungaraj popolkostumoj



* La aŭtoro estas ĉefredaktoro de "Hungara Vivo". Li verkis tiun ĉi artikolon laŭ la peto de nia redakcio.

estas tute ebena. Necesas nur minutoj por iri el la centro de la metropolo al la Gerharda monto, staranta tuj ĉe Danubo, kaj kvaronhora promeno por atingi la supron, de kie oni povas vidi la tutan urbon: la montetojn kaj aleojn de Buda, la mallarĝajn stratetojn, barokajn domojn kaj gotikan katedralon de la historia kvartalo, la pompajn bulvarojn de la fiere monduma Pest.

Budapesto krom la situo havas ankaŭ aliajn specifojn. Tiuj estas ekzemple termobanejoj; la hungara ĉefurbo estas kvazaŭ kolektejo de la plej diversaj sanigaj mineralaj akvoj. La banejoj

efikas tamen ne nur per sia akvo, sed ankaŭ per sia tre unika kaj karakteriza arkitekturo.

La Sporthalo "Budapest", la kongresejo de la 68-a UK, troviĝas en Pest, je ĉ. 3 kilometroj for de Danubo. Ĝi estis konstruita antaŭ nur kelkaj jaroj, kaj enhavas la plej modernajn instalaĵojn, kiuj certigas agrablan restadon por la kongresanoj. Proksime al la kongresejo troviĝas stacio de la urba subtera fervojo, pluraj agrablaj restoracioj kun bonaj manĝaĵoj, trinkaĵoj, belaj sukeraĵoj ktp. La prezoj en Budapesto — kaj en tuta Hungario — estas moderaj: por unu dolaro

oni povas uzi 40-foje tramon aŭ eniri ok muzeojn, por du dolaroj tagmanĝi en modesta (tamen ne memserva!) restoracio, kaj por ĉ. dek du dolaroj oni povas mendi biletojn por ĉiuj dek teatraj programoj de la 68-a UK. . .

Budapesto estas ankaŭ eminenta elirpunkto por ĉiaj ekskursoj. Sufiĉas veturi nur 50-100 kilometrojn por atingi ĉiujn karakterizajn regionojn de Hungario. Veturante al oriento, oni renkontas la orientan ebenajon, kiu en la hungara kulturo estas rigardata kiel simbolo de libero. Je ĉ. 200 kilometroj de Budapesto situas la Nacia Parko

Budapesto



“Hortobágy”, pejzaĝo stepa, konservanta sian iaman fizionomion. La “ĉefurbo” de tiu ĉi regiono estas Debrecen, urbo de la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Sekve tiuj gejunuloj, kiuj post IJK veturos al Budapesto, nepre trapasos la vidindan Nacionan Parkon.


Veturante al okcidento, oni povas admiri la variecon de la montetoj kaj valetoj en Transdanubio, kaj la unikan lagon Balatono, kies milda akvo povas refreŝigi milionojn dum la varmaj someraj tagoj. Balatono amplek-

sas 595 km², kaj hungaroj iom fiere nomas ĝin “hungara maro”.

Se oni elektas la nordan direkton, tuj forlasinte Budapeston oni trovas sin en la pitoreskaj vilaĝoj de la regiono Danubkurbo, kiuj allogas tre multajn hungarajn pentristojn. Troviĝas en tiu ĉi regiono ankaŭ pluraj urbetoj kun vidindaj historiaj memorajoj. Daŭrigante la veturadon al nordo, oni atingas la montaron Börzsöny. Ĝi estas vere arbara-montara regiono, eĉ se la montoj varias nur inter 7-800 metroj, la etoso estas perfekta.

Tamen, Hungario por esperantistoj neniam povos esti nura turisma celo, ja Budapesto dum jardekoj estis unu el la ĉefaj centroj de la Esperanta kulturo, ĉi tie vivis kaj verkis Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy, kiu lasta sukcesis vekti eĥojn eĉ en la geografie fora, sed emocie tre proksima granda ĉina kulturo, kies pruvo estas la bela romano de Ba Jin: “Aŭtuno en la Prin-tempo”. Ĉi tie aperis “Literatura Mondo”, eble la plej prestiĝa revuo de la kulturhistorio, kaj

Sporthalo de Budapesto, kie okazos la 68-a Universala Kongreso de Esperanto



amaso da valoraj libroj. Libroj ankaŭ nuntempe abunde produktiĝas en Budapesto: la plej grava eldonaĵo por la 68-a UK estos ĉ. 600-paĝa luksa "Hungara Antologio", kiu prezentos la hungaran

literaturon per trafe elektitaj specimenoj ekde la komenco ĝis la nuna tempo.

Hungario estas malgranda lando, kun meze evoluinta in-

dustrio, moderna agrikulturo, kaj 11 milionoj da gastamaj loĝantoj. Ili volonte invitas ĉiun esperantiston al Budapesto por fruktodona kongresa laboro kaj agrabla restado.



ESPERANTO INSTRUATA EN LA UNIVERSITATO DE CHENGDU

Post kiam la Eduka Ministerio de Ĉinio denove anoncis, ke Esperanto estu instruata kiel nedeviga lernoobjekto, la Universitato de Chengdu decidis doni lecionojn de Esperanto al studentoj de la angla-lingva fako de aprilo ĉi-jare. Mu Bing, konsilanto de la Chengdu-a Esperanto-Asocio, instruos okdek lernohorojn por unu semestro.

LA TELEVIDA STACIO DE ANHUI RAPORTIS PRI ESPERANTO

La 7-an de aprilo ĉi-jare la Televida Stacio de Anhui-provinco raportis pri Esperanto en la rubriko "Kulturo kaj Vivo" kaj telesendis la televidan filmon «Esperanto», kiu prezentas la evoluon de Esperanto, la Esperanto-movadon de Ĉinio kaj aliaj landoj, la progresigan Esperanto-kurson sub la Universitato de Anhui kaj la Huainanan Korespondan Lernejon de Esperanto.

ESPERANTO EN YUNNAN

En la lastaj du jaroj la Yunnan-a Esperanto-Asocio multe laboris por

propagandi kaj disvastigi Esperanton, subtenate de la provinca registaro kaj la provinca kultura kaj eduka departemento. En la vintraj ferioj de 1982 ĝi kaj la Universitato de Yunnan kune funkciigis la unuan rapidan kurson de Esperanto. Post tio ĝi kaj la provinca biblioteko kune okazigis ekspozicion de Esperantaj eldonaĵoj, kiu daŭris unu semajnon. Ĝi ankaŭ funkciigis Esperantajn elementajn kaj mezgradajn kursojn respektive kun la Ĉina Postlabora Perfektiga Lernejo, la vespera universitato Huaying, la Amasa Arta Domo de Yunnan, la Teatra Trupo de Yunnan kaj la Kunming-a Socia Universitato. La kursojn vizitas profesoroj kaj docentoj de altlernejoj kaj aktoroj de la provinco. Ankaŭ

Gejiu kaj aliaj urboj plurfoje funkciigis Esperantajn kursojn.

LA ESPERANTA POEMARO «PRIMAVERAJ ELEGIOJ» ELDONITA

La poemaro estis eldonita de la Huainan-a E-ligo. En ĝi estas 133 poemoj originale verkitaj de Armand Su en 1956-1968.

HELPO AL MEMLERNANTOJ DE NIA LINGVO

La 27-an de marto membroj de la progresiga Esperanto-kurso sub la Universitato de Anhui donis konsilojn al junaj komencantoj en la centro de Hefei, la ĉefurbo de la provinco Anhui. Informiĝinte pri

Membroj de la progresiga Esperanto-kurso sub la Universitato de Anhui en volontula servo sur strato por helpi komencantojn





La Ekspozicio de Esperantaj Eldonaĵoj okazigita de la Yunnan-a E-Asocio kaj la Yunnan-provinca biblioteko, en Kunming

tio, iuj gejunuloj rapidis tien por ricevi helpon. La aktivado levis ilian entuziasmon por lerno de nia lingvo kaj trovis simpatiantojn. Oni aranĝos tian aktivadon ankaŭ estonte.

La saman tagon la Huangshi-a Esp-Asocio havis aktivadon "Servi al Vi" en la centro de la urbo. 30 esperantistoj kun verda stelo sur la brusto varme akceptis interesojn, respondis iliajn demandojn, vendis al ili Esperantajn eldonaĵojn je favora prezo kaj senpage surbendigis por ili esperantaĵojn.

La Koresponda Esperanto-Kurso de Huangshi akceptis la paralizitan knabinon Zhang Haidi kiel apartan kursanon, sendis al ŝi Esperantajn librojn kaj sonbendojn. La kurso helpas ankaŭ aliajn handikapulojn, kiuj deziras lerni Esperanton. Nun tri pliaj kriplaj junuloj kaj unu plia soldata invalido skribis, ke ili volas lerni la lingvon. La kurso plenumos ilian deziron.

GÜNTER BECKER EN PEKINO

S-ro Günter Becker, la antaŭa ĝenerala sekretario de UEA kaj honora prezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, vizitis Ĉinion en aprilo ĉi-jare. Dum sia restado en Pekino li renkontiĝis kun Pekinaj esperantistoj kaj faris

raporton laŭ la invito de la Pekina Esperanto-Asocio.

El Pollando: Ĉe vojevodia kulturdomo en Opole agas E-klubo kaj filio de Pola E-Asocio jam ĉ. 20 jarojn. Tie ĉiu-jare okazas Espkursoj por komencantoj kaj progresintoj, kiujn instruas gesamideanoj Kazimierz Strzelecki kaj Ludmila Hubczenko. Dum la pasintaj 11 jaroj ĉiu-maje okazis interesa renkonto de sileziaj esperantistoj el la sudaj partoj de Pollando, kaj ĝin ofte partoprenis ankaŭ samideanoj alilandaj.

El Rumanio: La sekcio pri interlingvistiko kaj Esperantologio en la bukareŝta filio de la Societo de Filologiaj Sciencoj en S.R. Rumanio okazigis, la 26-an de marto, scienca sesion dediĉitan al la Internacia Jaro de la Komunikado 1983. Temas interalie pri la lingva komunikado en la servo de la scienco. Antaŭ duoncenta aŭskultantaro oni prezentis dek unu komunikajojn kun speciala atento al la planitaj lingvoj precipe al Esperanto. Pri la aranĝo raportis scienca periodaĵo kaj vaste legata revuo.

El Francio: La 38-a Kongreso de SAT-Amikaro, la franca sekcio de SAT, okazis, de la 2-a ĝis la 4-a de aprilo 1983, en la urbo Saint-Brieuc (San Brie). Partoprenis 170 gesamideanoj el ĉiuj partoj de Francio. Venis ankaŭ angloj, nederlandanoj, belgoj kaj germanoj. La inaŭguron ĉestis la urbestro, kiu esprimis bonvenigon al la kongresantoj, donis al la prezidanto de la kongreso urbomedalon kaj oferis al ĉiuj honorvinon.

La ĉefa temo de la kongreso estis: Esperanto-informado. La kongreso fine voĉdonis rezolucion invitante ĉiujn gesamideanojn al plej eble vasta diskonigado de Esperanto, kaj petante ĉiujn instancojn, deputitojn, instruistojn, k.a.

S-ro Grandère, la prezidanto, en parolado en la Kongreso de SAT-Amikaro



atenti la tutmondan komunikadon, kies problemon povas solvi tute taŭge la internacia lingvo ESPERANTO.

El Jugoslavio:


(1) Jam al la 17-a Pupteatra Internacia Festivalo okazonta inter la 6-10 de oktobro ĉi-jare en Zagrebo anoncis sin 34 teatroj el 15 landoj. La konsilantaro de ĉi tiu festivalo pro financaj kaŭzoj, krom jugoslavaj, devas elekti nur 8 eksterlandajn teatrojn. Tio signifas, ke geesperantistoj, kiuj venos Zagrebon

por tiu aranĝo, povos ĝui prezentaĵojn de teatroj el Sovetunio, Japanio, Bulgario, Svedio, Italio, Francio, Hungario, Hispanio kaj Jugoslavio. Oni ankaŭ pritraktas eblecon akcepti teatrojn el Rumanio kaj Pollando.

(2) Eduk-konsilantaro ĉe la edukministerio de Socialisma Respubliko Kroatio per sia dokumento 156/1-1982 sendita la 7-an de februaro 1983 aprobis al la Kroatia Esperanto-Ligo enkondukon de Esperanto kiel liberan aktivadon en

elementajn lernejojn (5-a ĝis 8-a klaso) kaj unuajn 2 klasojn de mezaj lernejoj. Kroatia E-Ligo nun preparas sin kune kun pedagogiaj instancoj de Kroatio por praktika starto en la aŭtuno 1983.

El Svislando: La Internacia Ferio-Semajno organizita de la Turista Asocio "La Naturamikoj", Esperanto Fakto (TANEF) okazos de la 4-a ĝis la 11-a de septembro 1983 en la Ferio- kaj Kulturcentro Appenberg, Zaziwil (Cecivil), Svislando.



Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

Karaj gesamideanoj de la tuta mondo, ĉu vi volas viziti Orienton senpage? Ĉu vi volas legi ion pri Oriento, ne hezitu postuli la unuan numeron de Orienta Esperantisto kun pago de unu respondkupono kaj skribu al: Matur Turizm Oficejo P.K. 149 Bursa Turkio.

* La nove fondita Sevilla Esperanta Junulara Organizo deziras korespondi kun tutmondaj junularaj organizoj por interŝanĝi opiniojn kaj diskuti problemojn komunajn. Adreso: S.E.J.O., Sol 75 Sevilla-3, Hispanio.

* Esperanto-Grupo en Radom (18-j. ĝis 40-j.) deziras korespondi

tutmonde pri diversaj temoj. Skribu al: Pola Esperanto-Asocio, Vojevodja Filio, str. Mickiewiczza 3m5, P1-26-600 Radom, Pollando.

* Mi serĉas korespond-amik(in)on kiu helpos al mi ekkoni vivon, naturon, arton kaj kulturon en Ĉinio. Rekompenco laŭ interkonsento. Kerel Strouha, Kamenice, 114, CS-547 01 Nachod, Ĉeĥoslovakio.

* 38-jara Stanislav Kareš, agronomo-plantkuracisto, Tylova 1262, 508 01 Horice, Ĉeĥoslovakio, serĉas agrikulturistojn kaj samfakulojn.

* 13-jara Mikael Hultgren, Roddargatan 2, S-603 65, Norrköping, Svedio, dez. kor. kun geesp-istoj, precipe kun tiuj en Ĉinio kaj Nepalo. Hobioj: poŝtmarkoj, libroj, astronomio.

* Miguel Termes de ea Torre (emerita muzik-instruisto), c/. Pedro Moragues 9, Barcelono 19, Hispanio, dez. kor. tutmonde, interŝanĝi p.m., p.k. ktp.

* 14-jara Šošfarić Jadranka, Dolac 16, Yu-41230 Krapina Jugoslavio, dez. kor. kun geamikoj el Ĉinio.

* 24-jara fraŭlo Frans Portelli, 67, Qormi Road, Marsa, Malta, deziras korespondi tutmonde kun gejunuloj pri ĉ. t. kaj interŝanĝi bildkartojn.

* 15-j. knabo Sławomir Lis, ul. W. Świątych 39, 32-659 Kety, woj. Bielskie, Pollando, dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj, sed speciale pri kemio.

* 10-jaraj geknaboj ŝatus korespondi kun simila eksterlanda grupo. Adreso: La Klaso 4/B, Papa, Kerekes. 29, H-8500, Hungario.

* 36-j. teknikisto Jan Kociemski, 44-224 Knurów Ulica Manifestu Lipcowego 6/8/11 Skr. Pocz. 24, Pollando, deziras korespondi kun la tuta mondo, precipe el Ĉinio, Japanio kaj Aŭstralio, pri ĉiuj temoj.

* UFOlogisto deziras korespondi kun personoj kiuj kontaktigis eksterteranojn. Jozef Silvestre, C.P. 627, 13200-Jundiai, SP, Brazilo.

* Deziras korespondi en la internacia lingvo kun geamikoj el orient-aziaj landoj, precipe el Japanio, s-ino Rosita Weber, Behaimring 20, D-4300 Essen, F.R. Germanio.

* Clement Payan, 05500-St. Bonnet, Francio, deziras interŝanĝi papilionojn kun ĉinoj.

* Jerzy Tkazyk, ul. Wybrzeże Kosciuszke 72/22, PL-37-704, Przemysl-6, Pollando, deziras korespondi kun amikoj pri sporto kaj bildoj de ĉiuj landoj.

MIA NASKIĜOTAGO

LA somero de tiu jaro estis tre varma. Mi ankoraŭ memoras, ke tiam mi ofte rigardadis la sen-nuban ĉielon, petante pluvon en la koro.

Kiam alproksimiĝis mia naskiĝotago, mi grave malvarmumiĝis¹ kaj devis kuŝi sur lito. Tiam mi sentis, ke nenio estas pli teda ol kuŝi malsane.

Jen alvenis mia naskiĝotago. Vekiĝinte mi trovis donacojn ĉe mia kapkuseno. Mi tuj malfermis la paketojn, kaj min ekkaptis ĝojo kaj samtempe ia malespero. La kaŭzo, mi pensis, eble kuŝis en tio: Mi ankoraŭ ne tute resaniĝis, kaj krome, la varmego iom sufokis² min.

Kiam mi matenmanĝis sur la lito, subite aŭdiĝis de ekstere agrabla susurado de pluvo. Ho! Kiel bela sono. Ŝajne, la aero fariĝis freŝa kaj ne plu tiom sufoka.

Komforte kuŝante en la lito, mi ekmemoris la paroladon, kiun mi faris kun mia amiko antaŭ kelkaj semajnoj. Ni parolis pri muziko kaj mi pretervole esprimis deziron akiri violonon³.

“Kial vi ne petas vian patron ĝin aĉeti por vi?” demandis mia amiko.

“La afero ne estas tiel facila,” mi respondis, “li ne volas, ke mi lernu muzikon.”

“Do, esperu!” diris la amiko.

“Kion signifas via ‘esperu?’” mi demandis.

Li ekridetis, kaj liaj okuloj brilis de ĝojo. “Kiam mi deziras ion, mi

ĉiam atendas kun espero. Tiu espero povas fariĝi realo⁴. Mi ne mensogas,” li diris.

Ĉe tio ni ambaŭ ekridis. De tiam mi tenas tiujn vortojn en mia memoro. Kiam mi ion deziras, mi ĉiam atendas kun espero. . .

Pro mia malsano mia naskiĝotago ne estis festita. Tamen mi sciis, ke certe venos al mi kelkaj amikoj.

En la lulkanto de la pluvo mi dormis dolĉan dormon kaj vere ne sciis, kiom da tempo mi dormis. Mi subite vekigis kaj trovis antaŭ mi konatajn ridantajn vizaĝojn.

“Feliĉan naskiĝotagon!” ĉiuj ekkriis.

Mi sidiĝis en la lito kaj mire direktis miajn okulojn maldekstren, ĉar tie kuŝis violono longe esperata

de mi. Mi palpebrumis por reteni gajajn larmojn en la okuloj kaj mire rigardis tiujn konatajn vizaĝojn.

Miaj amikoj sin ĵetis al mi kaj ĉirkaŭprenis min, dirante: “La violono estas donacita de ni kelkaj amikoj.”

Mi rigardis la patron, kaj ankaŭ li ridetis.

“La espero jam fariĝis realo,” mi diris al mi mallaŭte kaj ĝoje ĉirkaŭprenis la muzikilon.

Novaj Vortoj:

1. Malvarmumiĝi: malsaniĝi de malvarmo.
2. Sufoki: malhelpi spiradon.
3. Violono: kvarkorda muzikilo ludata per arĉo.
4. Realo: tio, kio efektive ekzistas.



Ilustrita de WANG ZHAOHUI

LA ĈINA EKONOMIO AKIRIS NOVAJN SUKCESOJN EN 1982

La Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio publikigis en la fino de aprilo komunikajon pri plenumo de la plano por la 1982-jara nacia ekonomio kaj socia disvolvo: La totala socia produktovaloro de Ĉinio en 1982 estis 989.4 miliardoj da juanoj, kun kresko de 9% kompare kun tiu de 1981. El ĝi la totala industria kaj agrikultura produktovaloro estis 829.1 miliardoj da juanoj, kun kresko de 8.7% kompare kun tiu de 1981. Laŭ unuapaŝa kalkulo la nacia enspezo estis 424.7 miliardoj da juanoj, kun kresko de 7.4% kompare kun tiu de 1981.

La komunikajo montris ankaŭ la ĉefajn problemojn en la disvolvo de la nacia ekonomio de Ĉinio: Troa pliiĝo de la investo al la fiksa kapitalo, tro vasta uzo de kapitalo kaj malbona ekonomia efiko en produktado, konstruado kaj cirkulado ne ricevis evidentan pliboniĝon; la energia liverado en nemalmultaj lokoj estis ne sufiĉa kaj la transportado estis relative streĉita.

DUOBLIĜIS LA NETA ENSPEZO DE LA ĈINAJ KAMPARANOJ EN KVAR JAROJ

Kun la rapida disvolviĝo de la produktado, duobliĝis la meznombra neta enspezo de ĉiu kamparano de Ĉinio en la lastaj kvar jaroj. Tio neniam okazis post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949.

Tiu statistika cifero estis ricevita de la Ŝtata Statistika Buroo post specimena statistiko al pli ol 22 000 kamparanaj familioj en 589 gubernioj de 28 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj.

La statistiko montris, ke la meznombra neta enspezo de ĉiu kamparano de Ĉinio en 1982 estis 270.11 juanoj, sed en 1978 133.57 juanoj.

LA PRODUKTOKVANTOJ DE KOTONO KAJ OLEDONAJ SEMOJ ATINGIS LA PLANITAJN NORMOJN ANTAŬDATE

La totalaj produktokvantoj de kotono kaj oledonaj semoj de Ĉinio jam superis la normojn difinitajn de la Sesa Kvinjara Plano de Nacia Ekonomia Disvolvo tri jarojn pli frue.

La plano difinis, ke la totala kotona produktokvanto de Ĉinio en 1985 estos 3.6 milionoj da tunoj, sed tiu en 1982 jam atingis 3.598 milionojn da tunoj; kaj la totala produktokvanto de oledonaj semoj en 1985 estos 10.5 milionoj da tunoj, sed tiu en 1982 jam atingis 11.817 milionojn da tunoj.

SCIENCAJ LABORANTOJ PREMIITAJ

La Inventaĵo-Komisiono de la Scienca kaj Teknika Komitato de Ĉinio lastatempe juĝis kaj sankciis 39 inventojn, el kiuj 1 ricevis la unuan premion, 6 la duan premion, 18 la trian premion kaj 14 la kvaran premion.

Bonspeca sojfabo "Tiefeng 18", kiu ricevis la unuan premion, estis grandaree kulturata en la lastaj dek jaroj. Ĝi estas elkulturita de agronomoj de la Tieling-regiona Agronomia Instituto de Liaoning-provinco kaj havas vastan adaptiĝemon kaj altan produktokvanton.

ĈINIO RIĈAS JE ILMENITO

La Geologia kaj Minerala Ministerio de Ĉinio montris per fidinda materialo, ke la totala rezervo-kvanto de ilmenito en Ĉinio estas

pli-ol-duoblo de tiu de ĉiuj aliaj landoj.

Titano kaj ĝia alojo havas pli malgrandan graviton, altan fortecon kaj rezistemon kontraŭ alta temperaturo, ultramalalta temperaturo kaj korodo. Ĝi estas grava metalo por fabriki aviadilon, rake-ton, ŝipon, militŝipon kaj subakvan ŝipon. Ĝi ankaŭ estas vaste uzata en metalurgio, malpeza industrio, preparado de salo, alkalo ktp.

PREMIO AL KANTOJ PRI NACIECA UNUIĜO

Ĉinio okazigis en Pekino la Tutlandan Kunvenon por Premii Kantojn pri Nacieca Unuiĝo en la fino de aprilo. La verkintoj de 60 kantoj ricevis premiajn atestilojn kaj premiojn.

Kolektado de la kantoj pri nacieca unuiĝo estis farita unufoje post la fondiĝo de la nova Ĉinio kaj iniciatita de la Ŝtata Komisiono de Naciecaj Aferoj kaj la Ĉina Muzikista Asocio. Ili elektis 60 el 459 kantoj; el la 60 elektitaj kantoj 8 ricevis la unuan premion, 15 la duan premion kaj 37 la trian premion.

Tiu kolektado ludos aktivan rolon por disvolvi la socialisman naciecan rilaton de egaleco, unuiĝo kaj interhelpo inter la diversaj naciecoj kaj akceli ilian komunan prosperon.

ĈINAJ AKROBATOJ RICEVIS ORAJN MEDALOJN

En la komenco de la kuranta jaro la Ĉina Akrobata Grupo gvidata de Xia Juhua ricevis tri orajn medalojn en la Sesa Internacia Akrobata Festivalo "Morgaŭ" okazigita en Parizo. La programeroj premiitaj estis "Turnado de Teleroj" de la Hangzhou-a Akrobata Trupo, "Pieda Akrobataĵo" de la Heilongjiang-a Akrobata Trupo kaj "Piedojetado de Bovoj sur Alta Biciklo" de la Shenyang-a Akrobata Trupo. Tiuj

akrobataĵoj havas fortan nacian stilon de Ĉinio.

MITTERRAND DONIS AL BAKIN LA ORDENON DE "HONORA LEGIO" DE FRANCO

Invitite de la ĉina registaro, la franca prezidento Mitterrand faris oficialan viziton al Ĉinio en la unua tagdeko de majo 1983. Je la 7-a de majo prezidento Mitterrand donis en Ŝanhajo la ordenon de Francio al la fama ĉina verkisto Bakin.

Mitterrand diris en la orden-dona ceremonio, ke s-ro Bakin estas ne nur granda verkisto, sed ankaŭ granda pensulo. Liaj verkoj "Familio" kaj "Malvarma Nokto" estis jam tradukitaj en la francan lingvon kaj bone akceptataj de francaj legantoj, ankaŭ liaj aliaj verkoj estos tradukitaj en la francan lingvon. Li laŭdis, ke la verkoj de Bakin estas plenaj de simpatio al la homaro, donis al la subpremataj nacioj fortojn kaj faris grandan kontribuon al la civilizacio de la mondo.

En varma aplaŭdo prezidento Mitterrand alpinglis sur la brusto de Bakin la ordenon ligitan per ruĝsilka rubando.

Bakin dankis la francan prezidenton pro la donita honoro. Li diris: "Tio, ke la prezidenta ekscelenco ĉi-foje venis al Ŝanhajo kaj donis al mi ordenon, montras respekton al la ĉina kulturo kun longa historio kaj estas ankaŭ simbolo de la amikeco de la franca popolo al la ĉina." Li esprimis, ke li faros pli grandan klopodon por disvolvi la amikecon kaj la kulturan interŝanĝon inter la ĉina kaj franca popoloj.

Bakin donacis al prezidento Mitterrand la unuajn dek binditajn volumojn de "Elektitaj Verkoj de Bakin".

Bakin estas fama esperantisto. Li funkcias kiel vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

KARBOBAZO DE LA INTERNA MONGOLIO EN KONSTRUADO


En la fino de la 20-a jarcento la Interna Mongolio fariĝos la dua karbobazo en Ĉinio, post Ŝanxi-provinco.

La Interna Mongolio estas tre riĉa je karbo, kies konstatita rezervokvanto atingas 190 miliardojn da tunoj. La karbo estas bonkvalita, la karbotavolo dika kaj taŭga al subĉiela ekspluatado. La karbokampoj situas proksime de la gravaj industriaj regionoj de la Nordoriento kaj norda Ĉinio.

102 ŜAKTOJ EN STREĈA KONSTRUADO

Nun Ĉinio rapidigas konstruadon de siaj karbobazoj. Laŭ projekto la 102 konstruataj ŝaktoj povos produkti pli ol 100 milionojn da tunoj da karbo ĉiujare. Interalie estas 34 grandaj kaj mezgrandaj ŝaktoj. Estas senprecedence en Ĉinio samtempe konstrui tiel multajn grandajn ŝaktojn.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. *Shandong-provinco*
2. *Fujian-provinco*
3. *Jinshan-gubernio*
4. *Xianning*
5. *Jiaxing*
6. *Hangzhou*
7. *Yangzhou*
8. *Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono*
9. *Heilongjiang-provinco*
10. *Jilin-provinco*
11. *Sichuan-provinco*
12. *Shaanxi-provinco*
13. *Gansu-provinco*
14. *Guangdong-provinco*



Zhang Haidi legas EPĈ.

ŜI KORTUŜAS GEJUNULOJN

de HONG YING

“Bonan tagon!”
“Bonan tagon!”
“Kiel vi fartas?”
“Bone, mi dankas vin!”
. . .

Ni tiel nin salutis en Esperanto, sed tiuj ordinaraĵoj vortoj estigis en mi fortan emocion. Mi ne atendis, ke la junulino antaŭ mi povas paroli Esperante dank’ al memlernado, junulino veninta el iu urbeto kaj. . . kaj trafita de pliampleksigita paraplegio. Kiam mi diris, ke ŝi parolas la lingvon bone, ŝi preskaŭ saltis de sur sia rulseĝo pro ĝojo. Esperanto, tiu magneta lingvo, tuĵ proksimigis nin unu al la alia kiel du malnovajn amikojn, kaj ni komencis interbabili senĝene. Kompreneble, ŝiaj malfacilaj travivaĵoj fariĝis la ĉefa temo de nia konversacio.

HAZARDA FALO — DUMVIVA BEDAŬRO

Ŝi, el Shandong-provinco, Ĉinio, nomiĝas Zhang Haidi aŭ,

karese, Lingling. Ŝi estas 28-jara, sed ŝiaj malsupraj membroj paraliziĝis antaŭ 23 jaroj. Malgraŭ la longa turmento de la malsano, ŝi montriĝas energioplena kaj serena. Kun viol-kadraj okulvitroj sur la nazo kaj bela hararo pendanta sur la ŝultroj, ŝi de tempo al tempo interrompis sian rakonton per arĝentaj ridoj. Kiu ja povus kredi, ke ŝi estas paciento, al kiu oni faris ablacion de ses vertebroj kaj kies korpon la malbeninda paraplegio invadis ĝis la brusto, se oni ne propr-okule vidus ŝin senkompatate katenita al ŝia rulseĝo!

Ŝi estis vigla kaj petolema knabineto. Iun tagon en 1960 ŝi, apenaŭ kvinjara, falis teren, kiam ŝi kuris el ludilo-ĉambro de infanĝardeno, kaj ŝiaj du gamboj tuĵ perdis movkapablon. Ŝi tute ne atendis, ke de tiam la minaco de malsano kaj morto nedisigeble ligiĝos kun ŝia sorto. Ekde sia sesa jaro, ŝi ricevis kvar grandajn kirurgiajn operaciojn kaj

spertis malfacile elteneblajn dolorojn kaj turmentojn. Ŝi tamen neniam ploris nek kriis, malgraŭ ke iafoje pro netolerebla doloro ŝi ĝisŝvele mordis al si la lipojn aŭ ŝiris sian litkovrilon per la dentoj. Ŝi venkis la malsanon per sia fera volo.

LIBROJ — LA FONTO DE FORTO

Depost tiam ŝi strikte kateniĝis al sia lito. Lito, malgranda ĉambro — ŝia tuta mondo. Ĉiufoje kiam ŝi vidis tra la fenestro aliajn infanojn irantaj al lernejo kun sia ŝultrosako, ŝi elkore ilin enviis. Foje ekscitite, ŝi forte batis al si la rigidajn femurojn kaj kriis kun larmoj en la okuloj: “Mi volas iri! Mi volas viziti lernejon!”

La forta soifo al scioj instigis ŝin al memlernado. Ŝi kuŝis surventre kaj apogis sin sur la kubutoj por fari skribadon. Tiamaniere ŝi finlernis ĉiujn lern-



Zhang Haidi interparolas kun esperantistino Tan Xiuzhu.

objektojn de la elementa lernejo kaj mezlernejo sur sia malgranda lito. Kompreneble, ŝia lernado iris pli zigzage kaj ŝi elspezis pli multe da tempo tiuflanke ol sanaj infanoj. Foje por unusola aritmetika problemo ŝi trovis 12 malsamajn solvojn pro sia miskalkulo, sed anstataŭ deprimiĝi ŝi prenis tion kiel provon al sia volo.

Pro konstanta kuŝado aperis sur ŝia korpo granda areo da litulcero kaj la infektado ofte kaŭzis febron. Por mildigi sian doloron ŝi komencis legi literaturajn verkojn pri diversaj herooj, kiuj plivastigis ŝian horizonton kaj donis al ŝi forton, tiel ke ŝi vidis antaŭ si esperigan mondon. Paul Korĉagin, heroo en la sovetia romano "Kiel Ŝtalo Hardiĝis", kiu neflekseble batalis kontraŭ sia paralizo, forte ŝin impresis, kaj ŝi ekkomprenis, ke timinda ne estas malsano, sed perdo de memfido kaj forto por sin progresigi, kaj ke oni povas venki ĉiajn malfacilojn kaj krei al si novan feliĉan vivon, se nur lia spirito ne disfalas.

INTER VILAĜANOJ

En aprilo 1970, la tuta familio de Haidi provizore transloĝiĝis al vilaĝo malproksima de la gubernia urbo, kie ili antaŭe loĝis. La loĝantoj tie estis malriĉaj, sed bonkoraj. Ŝi skribis en sia taglibro: "Ĉi tie ĉiuj amike min traktas, tiel ke mi ilin pli amas. Karaj vilaĝanoj, kiel mi deziras ion fari por vi!"

En la vilaĝo estis knabeto nomata Meng Fang. Pro kompato al tiu kripla fratino, li ofte venis ŝin akompani. Li foje alportis hirundon, kiu ne povis flugi pro vundo sur la kruro. Haidi ekhavis simpatian por ĝi. Ŝi aplikis topikon sur ĝia vundita kruro, faris bandaĝon kaj bredis ĝin sur la fenestrobreto. Kiam la birdo resaniĝis, ŝi lasis ĝin reflugi en la aeron. La knabeto Meng Fang ĝoje diris: "Franjo Lingling, vi resanigis la hirundon, vi ja estas kuracisto."

Tamen, post nelonge, okazis io neatendita, kio terure skuis la

animon de Haidi: pro manko de taŭga medicina kuracado la knabeto mortis de malsano. Ŝi unuafoje ekkomprenis, kian malfeliĉon alportas la malriĉeco kaj postiĝinteco. Kaj sekve ŝin pikis la memriproĉo: Kial mi ne lernis medicinon? Se mi estus kuracisto, la knabeto eble ne mortus. . .

POR MILDIGI LA SUFERON DE LA AMASOJ

"Mi volas lerni medicinon por mildigi la suferon de la amasoj, kaj por ke tragedioj kiel tiu pri la knabeto Meng Fang neniam okazu plu en la vilaĝo!" — jen la forta deziro de Haidi. Ŝi ŝparis ĉiujn monerojn, per kiuj ŝi aĉetis medicinajn librojn, klinikan termometron, stetoskopon, maneketon kaj medikamentojn. Ŝi komencis lerni akupunkturon kaj, gvidate de koncernaj libroj, provis praktiki ĝin sur sia propra korpo por sin spertigi. Ŝi esploris dissekcias ranojn, kokojn, anasojn, kuniklojn ktp. En la daŭro de dekelke da jaroj ŝi legis "Akupunkturo kaj Mokso", "Antroptomio", "Fiziologio", "Medicino pri Internaj Malsanoj", "Ĝenerala Skizo pri Kirurgio", "Manlibro de Klinika Medicino" kaj aliajn sume pli ol dek medicinajn librojn kaj, sub la helpo de aliaj, ellernis parton da lernolibroj de medicina instituto, tiel ke ŝi nun povas kuraci iujn ordinarajn kaj ofte okazantajn malsanojn.

Maljuna vilaĝano Geng paralizigis jam tri jarojn, rezulte de cerba trombo. Cetere, lia edzino mortis, lasinte al li tri infanojn. La familio vivis tre malfacile. Haidi ne nur kuracis lin per akupunkturo, sed ankaŭ skribis al diversaj lokoj por informiĝi pri

taŭgaj kuracrimedoj. Kiam la maljunulo ekkapablis denove piediri post periodo da kuracado, ŝi tre ĝojis, ke nun ŝi estas homo utila al la popolo.

Post kiam disvastiĝis la novaĵo pri la resaniĝo de Geng, venis al ŝi pli kaj pli multe da pacientoj el najbaraj vilaĝoj, iafoje eĉ kelkdek en unu tago. Ŝia malsana vertebraro ne permesis al ŝi longe sidi, kaj tial ŝi povis nur sin apogi sur la brakapogilo de sia seĝo por praktiki al la pacientoj akupunkturaron, kio ofte ĝisŝvite ŝin lacigis. Foje ŝi falis en fortan febron pro lacego. Vilaĝanoj maltrankvile svarmis antaŭ la pordo de ŝia loĝejo por informiĝi pri ŝia farto. Inter la popolamasoj ŝi, kripla knabino, neniam sentis solecon.

AL LABORO

Marton 1973 Haidi revenis al sia urbeto kune kun siaj gepatroj. Tiam ŝiaj iamaj amikoj aŭ laboris en fabrikoj, aŭ lernis en altaj lernejoj, kaj ŝi pensis, ke ankaŭ ŝi devas serĉi al si novan vojon de vivo, anstataŭ ĉiam sin fermi en malvasta ĉambro.

Ŝi komencis lerni pentradon. Kiam ŝi faris skizon kaj ĝin montris al sia amiko, tiu ŝin admonis: "Pentristo devas teni sian paletron per unu mano kaj sian penikon per la alia. Ĉu vi vere kredas, ke vi sukcesos en tio, dum vi apenaŭ povas vin teni en sidanta pozo?"

Ŝi do turnis sin al muziko. Kiam ŝi ellernis bivoludon, iu onklino diris, skuante la kapon: "Ĉu vi iam vidis, ke aktoro prezentas en sia rulseĝo sur scenejo?"

Kion do fari? Ŝi skribis al diversaj entreprenoj por peti laboron. Fine la gubernia hospi-

talo konsentis, ke ŝi laboru tie portempe kiel akupunkturisto. Ĉar ŝi estis fervora kaj afabla, multaj pacientoj volonte sin turnis al ŝi por kuracado.

Post taga laboro ŝi ofte revenis hejmen laca kaj elĉerpita, ke ŝi eĉ perdis apetiton por vespermanĝo. Kian malfacilon ŝi renkontis, ŝi tamen ĉiam tenis en si la aspiron: laŭeble servi al la socio kaj ne esti ties balasto. En la daŭro de la pasintaj kelkaj jaroj ŝi donis akupunkturaron al pli ol dek mil pacientoj. Dank' al ŝia kuracado, knabino, muta kaj surda, iom post iom reakiris

parolkapablon kaj poste fariĝis feliĉa edzino kaj patrino. Ankaŭ aliaj du knaboj, kiuj suferis de infana paralizo, ekpovis piediri post ŝia kuracado.

En la jaro 1981 Haidi havis oficialan laboron en la disaŭdiga stacio de la gubernio. Kia ĝojo ekkaptis ŝin! Ŝia pliampleksigita paraplegio portis al ŝi grandan maloportunecon en ŝia laboro, sed ŝia ĉiam freŝa kaj neniam malfortiĝanta entuziasmo paligis ĉiujn suferojn. Kiam ŝi laboris, sidante ĉe tablo, ŝi provis sin teni kun la abdomeno apogita sur tirkesto por ne gliti malsu-

Zhang Haidi faras akupunkturaron al avino.



pren. Estis apenaŭ tolereble sidi tiamaniere por longa tempo, sed ŝi persistis tagon post tago. Iuj ŝin demandis: "Ej, kial vi, paralizulo, tiel laboregas kontraŭ kelkdek juanoj ĉiumonate?"

En tiaj okazoj ŝi ŝatis respondi per la vortoj de Helen Keller, usona verkistino blinda kaj surda: Se mi povus rigardi tri tagojn, kian ĉarman spektaklon mi do vidus per miaj okuloj! Sed tiuj, kies okuloj normale funkcias, ĝin neglektas. Ĉe ili ĉiuj kolorriĉaj grandiozaj spektakloj en la mondo ekzistas tute nature. Ŝi diris, ke same tiuj, kiuj prenas sian laboron kiel ion rutinan kaj ordinaran, ne scias bone taksi sian rajton de laboro, sed por ŝi estas la plej granda feliĉo ion fari por la socio kaj popolo.

LERNO DE FREMDAJ LINGVOJ

Ŝi, kiu neniam vizitis lernejon, legis grandan kvanton da libroj de la gubernia biblioteko, utiligante la postlaborajn horojn en du jaroj. Ju pli profunde ŝi penetras en sian lernon, des pli forta fariĝas ŝia deziro por akiri novajn sciojn. Hazarda okazo instigis ŝin eklerni fremdajn lingvojn, kaj ŝi tuj absorbiĝis en tio. En la daŭro de kelke da jaroj ŝi lernis per si mem la anglan, germanan kaj japanan lingvojn kaj Esperanton.

Ŝi havas apartan amon por Esperanto. Foje ŝia patro portis hejmen libron pri Verda Majo, internaciistino kaj fama japana esperantistino, kiu kontribuis sian tutan vivon al la Esperantomovado. La tutan libron ŝi legis unuspire kaj estis forte kortuŝita. Ŝi decidis lerni Esperanton, pensante, ke se ŝi efektive ĝin eller-

nos, ŝi do havigos al si kvazaŭ plian paron da okuloj por observi kaj koni la mondon. Ŝi lernis nian lingvon per korespondada kurso duonjare kaj poste ĝin daŭrigis per si mem. Ŝi eĉ kunportis la lernolibron kiam ŝi iris labori. Kiam al ŝia hejmo venis gastoj, kiuj scias fremdan lingvon, ŝi tuj sin turnis al ili por peti helpon. Por pli bone parkerigi novajn vortojn, ŝi skribis ilin aŭ sur slipojn, kiujn ŝi gluis al la muro kaj librobretaro, aŭ rekte sur la manojn kaj brakojn. Ŝi eĉ destinis por si la taskon memori dek novajn vortojn antaŭ sia enlitiĝo ĉiuvespere.

La konstanta prenado de analgeziko foje kaŭzis al ŝi drogan toksigon. Ŝia spirado haltis unu horon kaj kvindek minutojn kaj ŝi kuŝis senkonscie kvin tagojn. Kiam ŝi rekonsciigis, ŝi trovis, ke en la urĝa kuracado la kuracistoj aplikis al ŝi medikamenton iritantan la centran nervan sistemon. Por konstati, ĉu la kuracilo difektis ŝian memoron, ŝi tuj lernis 16 fremdlingvajjn vortojn. Kaj kiam ŝi trovis en la sekva tago, ke ŝi ilin klare memoras, ŝi ekridis, ĉar ankoraŭfoje ŝi reprenis sian rajton de lerno el la mano de la Morto.

Post sia kvara operacio, ŝi tremadis de doloro, mordante sian litkovrilon. Kiam ŝi sukcesis iom sin kvietigi, ŝi tamen tuj petis siajn familianojn, ke ili donu al ŝi libron. Tiam ŝi povis nur kuŝi surdorse, kaj ĉiu moveto de la kolo tuj kaŭzis al ŝi tranĉan doloron. Ĉar nenia mal-konsilo efikis, oni povis nur meti ĉe ŝia kapo spegulon, dank' al kies reflektado ŝi atenteme eklegis fremdajn lingvojn. Ĉiuj ĉeestantaj parencoj kaj amikoj estis ĝislarme kortuŝitaj de ŝia nefleksebla karaktero. Ŝi ĉiam diris: "Mi nepre lernos kaj laboros, mi

nepre batalos kontraŭ la malsano, nur se mia koro batos. Mi kredas, ke mi estos venkanto."

ŜI SIMILAS AL MAGNETO

Post kiam ŝi paralizigis, ne nur ŝiaj familianoj paciencis ŝin fleugas, sed ankaŭ la socio turnas al ŝi sian prizorgon, kiu aparte ŝin kortuŝas. Kiam ŝi estis en hospitalo, flegistinoj helpis ŝin en lavado kaj kombado, eĉ ŝin trinkigis kaj manĝigis. En liberaj tagoj ŝiaj bonkoraj amikoj venis kaj per ŝia rulseĝo veturigis ŝin al parko aŭ kinejo. Dum pli ol unu jaro iu onklo veturis ĉirkaŭ 15 kilometrojn ĉiutage por fari al ŝi akupunkturajn kaj masaĝojn.

Ŝia hejmo fariĝis plej vigla angulo de la loko. Ŝi kvazaŭ magneto altiras al si multe da junaj laboristoj, lernantoj, instruistoj, kuracistoj kaj aktoroj. Ili senĝene babilas, kantas, lernas kaj diskutas ĉe ŝi, kiel intimaj gefratoj el unu familio.

La lastan marton Zhang Haidi veturis al Pekino por ĉeesti la Tutlandan Kunsidon de Reprezentantoj de Avangardaj Kolektivoj kaj Individuoj en Lerno de Lei Feng*. La Centra Komitato de la Komunista Junulara Ligo de Ĉinio honoris ŝin per la titolo "Eminenta Membro de KJL" kaj alvokis la gejunulojn de la tuta lando lerni de ŝi la senegoisman sindonemon. Post kiam ĵurnaloj kaj gazetoj de diversaj lokoj sinsekve raportis pri ŝiaj agoj, kiuj forte tuŝas la koron de gejunuloj, ŝi ricevis de ili pli ol 6 000 entuziasmajn leterojn, kaj ŝiaj amikoj nun pli kaj pli multiĝas.

* Lei Feng estis ordinara, sed fervore helpema soldato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. En 1963 li mortis sur sia posteno. Post kiam liaj agoj diskonigis en Ĉinio, li fariĝis bona ekzemplo lerninda por la gejunuloj tra la lando.

ZHANG HAIDI

(Bv. legi la artikolon "Ŝi Tuŝas la Koron de Gejunuloj" en tiu ĉi numero.)

Fotoj de MA ZHUANGYE,
LU SHIJIAN kaj LI XIA



Zhang Haidi



Zhang Haidi en lernado





Zhang Haidi kaj
jugoslava studentino

Zhang Haidi en biblioteko



Zhang Haidi kaj ĉina
generalo Li Zhen



Paralizitaj infanoj resanigitaj de
Zhang Haidi helpas ŝin en veturado.





Zhang Haidi kaj ŝiaj gepatroj kaj fratino

Zhang Haidi kaj ŝiaj geamikoj en kantado



LA CELO KAJ PAŜOJ DE ĈINA EKONOMIA DISVOLVO

de WANG TAO

DANK' al plurjara reordigo, la ĉina ekonomio komencis disvolviĝi stabile. Kalkulite laŭ fiksitaj prezoj, la totala produkto-valoraro de industrio kaj agrikulturo en 1981 je 21.6% plialtiĝis ol tiu en 1979, kaj en 1982 tiu de industrio kreskis je 7.7% kaj tiu de agrikulturo je 11% kompare kun tiu en 1981. Ĉinio sukcesis en siaj unuaj klopodoj forigi la seriozan perturbon en la proporcioj de la nacia ekonomio, ekvilibrigi la financajn en- kaj elspozojn kaj stabiligi la merkatan prezaron kaj la vivo de la popolo rimarkinde pliboniĝis.

LA CELO DE LA EKONOMIA DISVOLVO

Por puŝi sian tutan socialisman ekonomion antaŭen, Ĉinio strebas por kvaroblige la totalan jaran produktovaloron de industrio kaj agrikulturo en la tempo-daŭro de 1981 ĝis la fino de la nuna jarcento, t. e. levi ĝin de 710 miliardoj da juanoj en la jaro 1980 al 2 800 miliardoj da juanoj (proks. egale al 1 400 miliardoj da usonaj dolaroj) en la jaro 2000. Laŭ la normo de la evoluintaj landoj, tiu celo vere ne estas alta, tamen, se Ĉinio ĝin atingos, la modernigo de ĝia nacia ekonomio progresos konsi-

derinde, la enspezo de ĝiaj kamparanoj kaj urbanoj pluroble plimultiĝos kaj la materiala kaj kultura vivo de ĝia popolo multe pliboniĝos.

Por efektiviĝi la kvaroblige en 20 jaroj, la ĉina ekonomio devas kreski je pli ol 7% ĉiujare, tia kresko estas ne malalta. Ĉinaj ekonomikistoj opinias, ke la tasko estas peniga, sed realigebla.


Unue, en Ĉinio nun regas politika situacio de stabileco kaj unuigo, kaj la diversaj lokoj de la tuta lando jam turnis sian labor-centron al la socialisma moderniga konstruado. Oni havas pli profundan konon pri la reguleco de la socialisma konstruado ol antaŭe kaj pli da sperto en produktado kaj administrado.

Due, dank' al la socialisma konstruado en la pasintaj pli ol 30 jaroj, Ĉinio jam konstruis kompare kompletan sistemon de la nacia ekonomio. La produkto-valoraro de industrio en 1980 okupis 69.9% de la totala produkto-valoraro de industrio kaj agrikulturo, sed en 1952, nur 43.1%. Ĉinio nun havas pli ol 370 000 industriajn entreprenojn, kiuj apartenas al plej diversaj branĉoj kaj estas ĉiam pli racie dispoziciitaj. Pli favoraj fariĝis an-

kaŭ la kondiĉoj de agrikultura produktado, inkluzive la produktadon de akvomastromaj instalaĵoj, agrikulturaj maŝinoj kaj kemisterko kaj la disvastigo de bonspaciaj plantoj kaj brutoj. Dume, ankaŭ en scienca kaj teknika kampo Ĉinio akiris ĝojindajn atingojn.

Trie, en Ĉinio abundas naturaj riĉfontoj. Interalie la rezervokvantoj de karbo, petrolo, fero kaj akvoenergio ĉefe bezonataj en la ekonomia disvolvo okupas gravajn lokojn en la mondo. Se Ĉinio mobilizus ĉiujn latentajn fortojn de la nunaj entreprenoj pere de teknika reformado, ĝi povus multe altigi la ekonomian efikon kaj plirapidigi la tutan konstruadon, sen pliigo de aŭ kun malgranda pliigo de ekipaĵoj, krudaj materialoj, energio kaj laborforto. En agrikulturo, Ĉinio povas altigi hektaran produktokvanton kaj havas multegajn montodeklivojn, herbejojn kaj akvejojn por disvolvi terkulturadon, brut- kaj fiŝbredadon.

Krome, Ĉinio praktikas pordomalferman politikon al fremdaj landoj. Pere de ekonomiaj kaj teknikaj interesanoj, Ĉinio povas enkonduki avangardajn eksterlandajn teknikojn por puŝi sian ekonomian disvolvon.



Stala fervoja ponto super la rivero Hanshui en Ankang, Shaanxi-provinco

Oni ne tre precize taksis, ke Ĉinio povos efektiviĝi la planitan kvarobligon, se nur ĝiaj ĉefaj industriaj branĉoj atingos en produktaj teknikoj la nunan nivelon de ekonomie evoluintaj landoj en la jaro 2000.

TRI GRAVAJ BRANĈOJ KAJ DU STADIOJ

Nu, kiamaniere efektiviĝi la kvarobligon? La stato de la nuna ekonomio postulas, ke tri gravaj branĉoj devas esti emfazitaj en la ekonomia konstruado, t. e., unue, agrikulturo; due, energio-provizo kaj trafiko; trie, eduko kaj scienco.

Ĉinio havas miliardon da loĝantoj kaj, eĉ se ĝia naskolimigo estos bone plenumita, tiu nombro ŝvelos ĝis 1.2 miliardoj en la fino de la kuranta jarcento. Por tiel granda loĝantaro, la provizo de nutraĵoj ĉiam estas la plej grava afero. Ĉinio havas 800 000 000 kamparanojn kaj agrikulturo estas la bazo de ĝia nacia ekonomio. Por garantii stabilan disvolvon de agrikulturo, ĝi persistos en kolektivigo kaj publika posedsistemo pri la agraro kaj aliaj produktorimedoj kaj samtempe praktikos diver-

sajn respondec-sistemojn en produktado. Rilate la agrikulturan fundamentan konstruadon, oni plifortigo: la kontraŭinundan kapablon de la Flava Rivero kaj la riveroj Jangzi, Huaihe kaj Haihe, daŭrigos la konstruadon de gren-bazoj ĉe Sanjiang-ebenaĵo de Heilongjiang-provinco, Poyang-lago de Jiangxi-provinco, Dongting-lago de Hunan-provinco kaj Pishihang-irigaci-regiono de Anhui-provinco, daŭre konstruos ŝirm-forstajn zonojn en la nordokcidenta, norda kaj nordorienta partoj de Ĉinio kaj daŭre faros akvomastroman konstruadon por plirapidigi bridon de la grunda erozio ĉe la meza baseno de la Flava Rivero kaj sablovento en nordokcidenta Ĉinio. Ĉinio aktive disvolvos produktadon de grenoj, kotono, oleo kaj aliaj, forstumadon, brutobredadon, fiŝadon kaj aliajn, sinteze utiligante ĉiujn agrikulturajn riĉfontojn. Samtempe, ĝi pliigos la provizadon de kemisterko kaj agrikulturaj maŝinoj kaj popularigos avangardan agrikulturan teknikon por akceli la produktadon.

La nesufiĉa provizo de energio kaj la malakordo inter la trans-

porta kapablo kaj la kreskanta transporta kvanto prezentas sin kiel du evidentaj problemoj en la ekonomia disvolvo de Ĉinio. En la lastaj jaroj Ĉinio iom malrapidigis la disvolvon de energio-produktado, kaj la malŝparo de energio restis granda. Tial, la jara produktokvanto de karbo de 600 000 000 tunoj kaj tiu de nafto de 100 000 000 tunoj ankoraŭ ne sufiĉas por la ekonomia disvolvo. Pro nesufiĉeco de energio, ĉirkaŭ 10%—20% de la produkta kapablo ne povas plene elvolviĝi en iuj industriaj urboj en la nordorienta kaj norda partoj de Ĉinio. Por solvi la problemon, la registaro donas atenton kaj al la ekspluatado kaj al la ŝparado de energio. Prenante karbon kiel la ĉefan energio-fonton, Ĉinio konstruos nombron da novaj karbominejoj, precipe la karbo-bazon de Shanxi-provinco. Samtempe ĝi disvolvos novajn teknikojn de petrol-prospektado kaj ekspluatado, laŭplane ekspluatos ne nur la subteran nafton, sed ankaŭ la submaran. Profitante el siaj abundaj akvorezervoj, Ĉinio laŭeble disvolvos sian hidroelektran industrion en la estonteco.

Grupo da grandaj hidroelek-
trejoj konstruiĝos ĉe la supraj
kaj mezaj basenoj de la Flava
Rivero kaj la rivero Jangzi,
kaj grandaj termoelektrejoj ins-
taliĝos ĉe regionoj riĉaj je kar-
bo. Krome, Ĉinio konstruos an-
kaŭ kelkajn nukleajn elektrejojn.
Rilate al trafiko kaj transporto,
oni konstruos kaj rekons-
truos nombron da trunkaj fervo-
joj. Oni konstruos ĉ. cent pro-
fundakvajn ankrejojn ĉe 15
apudmaraj havenoj, por ke ilia
ŝarĝ-malŝarĝa kapablo atingu ĉ.
100 000 000 tunojn en la jaro
1990. Cetere, oni reguligos la
ĉefan fluon de Jangzi por levi
ĝian transportan kapablon.

Nun en multaj ĉinaj entrepre-
noj la produktaj teknikoj kaj
administrataj metodoj estas posti-
ĝintaj, kaj al ili terure mankas
teknikistoj kaj spertaj laboristoj,
kio multe malhelpas la ekono-
mian disvolvon. En Ĉinio nun
troviĝas 370 000 grandaj kaj mal-
grandaj entreprenoj kaj, se oni
aplikus avangardajn teknikojn
por redukti la konsumon de
energio kaj krudaj materialoj kaj
altigi la kvaliton de produktaĵoj,
tio povus duobligi la ekonomian
efikon. Sekve, la disvolvo de
scienco, teknikoj kaj eduko, pli
rapida kulturado de fakuloj
fariĝis ŝlosilo por realigi la
modernigon en Ĉinio. La regis-
taro plifortigos la mezgradan
profesian edukon, la altgradan
kaj aliajn edukojn inkl. de edu-
kado al kadroj, oficistoj, laboris-
toj, kamparanoj kaj analfabetoj,
por kulturi diversajn fakulojn
kaj altigi la sciencan kaj
kulturan nivelon de la tuta
nacio.

Ĝis la fino de la nuna jarcento
la ekonomia disvolvo de Ĉinio
trapasos du stadiojn: en la unuaj
dek jaroj oni ĉefe faros preparon,

akumulante fortojn kaj pretigan-
te fundamenton, dum en la sek-
vaj dek jaroj aperos ekonomia
prospero.

Kial la preparo bezonas dek
jarojn? Ĉar oni bezonas tempon
por forigi la perturbon en la pro-
porcioj de la nacia ekonomio, la
malakordon en la industria
strukturo kaj la malraciecon en
la organiza strukturo kaj admi-
nistrata sistemo de entreprenoj —
ĉion malutilan, postlasitan en la
longa pasinteco. Cetere, la kons-
truado por energio-provizo kaj
trafiko bezonas grandan invest-
ton kaj longan tempon, sed la
profitodono estas malrapida,
ekz., la ekspluatado de submara
nafto donos profiton en la mal-
frua periodo de la nuna jardeko,
kaj la konstruado de grandaj
karbominejoj, hidroelektrejoj kaj
fervojoj plenumiĝos nur post
pluraj jaroj. Pro manko de tek-
nikaj fortoj kaj monrimedoj, oni


povas konduki la esploradon pri
ŝlosilaj sciencaj kaj teknikaj pro-
blemoj kaj la teknikan reforma-
don al la ekzistantaj entreprenoj,
nur etskale anstataŭ grandskale.
Fine, por elkulturi taŭgajn faku-
lojn kaj altigi la teknikan kaj
administran nivelojn oni bezon-
os tempon. Tial, en la unuaj
dek jaroj la ekonomio ne povos
rapide disvolviĝi.

FIRMA IRADO AL MODERNIĜO

La 6-a kvinjara plano prak-
tikata ekde la jaro 1981 estas
grava paŝo por efektiviĝi la kvar-
obligon antaŭ la fino de la nuna
jarcento kaj ŝlosilo por plenumi
la dekjaran preparadon.

La nomita plano postulas, ke
oni daŭre praktiku la politikon
de "reordigo, reformo, reguligo
kaj altigo" por likvidi diversajn
postlasitajn problemojn, kiuj

La Farmo de Shouxihu post rikoltado



malhelpas la ekonomian disvolv-
von, radikale plibonigi la finan-
can kaj ekonomian staton kaj
pretigi fundamenton por la eko-
nomia kaj socia disvolvo en la
periodo de la 7-a kvinjara plano.
La 6-a plano diferencas de la
kvin antaŭaj kvinjaraj planoj per
jenaj trajtoj:

Unue, ĝi emfazas altigi la eko-
nomian efikon kaj difinas reali-
geblan rapidecon de la ekonomia
disvolvo. La antaŭaj planoj ofte
donis troan emfazon pri la rapi-
deco, sed neglektis la efikon.
Kvankam ili akcelis la eko-
nomian kreskadon, ili tamen estigis
multajn negativajn sekvojn. Em-
fazante la ekonomian efikon, la
nuna plano celas levi la totalan
produktovaloron de industrio kaj
agrikulturo ĝis 871 miliardoj da
juanoj en la jaro 1985, t. e., je
21.7% ĝin plialtigi kompare kun
tiu en 1980, kun meznombra jara
kreskado de 4% (Praktike oni
strebos atingi 5%). Tiu rapideco
estas objektiva kaj atingebla.

Due, ĝi rigore limigas la ska-
lon de la fundamenta konstruado
por certigi la sukceson de la ĉefaj
konstru-objektoj kaj fari tekni-
kan reformadon. Laŭ ĝia difino,
oni asignos al la fundamenta
konstruado de energio-provizado
kaj trafiko — du malfortaj bran-

ĉoj en la nacia ekonomio —
aparte grandan investaĵon, kiu
okupos 38.5% de la sumo inves-
tota por la tuta fundamenta
konstruado. En la pasinteco oni
atentis nur novajn konstru-obje-
ktojn en sia investado, sed
neglektis novigon kaj reforma-
don de la ekzistantaj instalaĵoj
kaj teknikoj. En la nuna plano
la investaĵo por novigo kaj refor-
mado konsistigas 36% de la
totala investaĵo por la fiksa ka-
pitalo, anstataŭ ĉirkaŭ 20% en la
pasinteco, kaj tio certe helpas
disvolvi la ekzistantajn entrepre-
nojn kaj altigi la kvanton kaj
kvaliton de iliaj produktaĵoj.

Trie, ĝi kombinas la disvolv-
on de ekonomio kun tiu de socio kaj
tiu de scienco kaj tekniko. Por
akceli la ekonomian kreskadon
ĝi enhavas la esploradon pri ŝlo-
silaj sciencaj kaj teknikaj proble-
moj, la popularigon de novaj
teknikoj kaj la disvolv-
on de novaj produktaĵoj kaj eĉ difinas la
proporcion de la novaj produk-
taĵoj en la ĉefaj industriaj pro-
duktaĵoj. Ĝi enhavas ankaŭ la
socian disvolv-
on, rilate la loĝan-
taron, laboron, enspezon kaj
konsumon de la loĝantoj, kons-
truadon de urboj kaj vilaĝoj,
publikan bonstaton ktp. Laŭ ĝia
difino, en la jaro 1985 la kvanto

de la loĝantara kreskado redukti-
ĝos ĝis malpli ol 1.3%, dum la
meznombra enspezo de kampa-
rano kaj la meznombra salajro
de oficisto kaj laboristo, kompa-
re kun tiuj en 1980, pliiĝos je
33.5% kaj 27.2% respektive.

Kvare, ĝi celas konstrui kaj la
materian civilizacion kaj la spiri-
tan, donante atenton ne nur al la
ekonomia disvolvo kaj al la pli-
bonigo de la materia kaj kultura
vivo de la popolo, sed ankaŭ al
la altigo de ilia socialisma kons-
cio por konstrui la landon dili-
gente kaj ŝpareme kaj starigi bo-
najn sociajn morojn. Tial, la
elspezo de la ŝtato por eduko,
scienco, kulturo, higieno kaj
sportoj je 68% pligrandiĝos
kompare kun tiu en la periodo
de la 5-a kvinjara plano.

La 6-a kvinjara plano plenu-
miĝas bone post du-jara prakti-
kado. La totala produktovaloro
de industrio kaj agrikulturo en
1981 devis kreski je 3.7% en la
plano, sed fakte ĝi kreskis je
5.5%; en 1982 la laŭplana kresko
estis 4%, sed fakte la kresko atin-
gis 8.7%. Nun la varoj sur mer-
kato estas kompare abundaj, kaj
en la ekstera komerco aperis fa-
vora saldo. Oni povas diri, ke la
tuta ekonomia situacio en Ĉinio
ja pliboniĝas jaron post jaro.



*Novaj etaĝdomaj blokoj
nordflanke de la strato
Fuxing en Pekino*

YANGZHOU

de LI PING

LA antikva kultura urbo Yangzhou situas ĉe la mal-supra parto de Jangzi-rivero. La urbo konstruiĝis en la periodo Printempo kaj Aŭtuno antaŭ 2 400 jaroj. Tiam la reĝo Fuchai de Wu-regno ordonis fosi la kanalon Han kaj konstrui la samnoman urbon, por ekspansii- ĝi sian teritorion kaj gajni hege- monion. La kanalo Han estis la plej frua kanalo de la mondo. En Sui-dinastio (581-618 p. K.) la urbo alinomiĝis Yangzhou.

La urbo havas zigzagan his- torion. En Tang-dinastio (618- 907 p. K.) tie prosperis komerco kaj ĝi fariĝis la centro de la in- terna kaj ekstera komerco de Ĉinio. Pro multjara militado ĝi estis ruinigita. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝi komencis sian novan konstruan periodon.

La urbo Yangzhou kun ĉar- maj pejzaĝoj kaj multaj vidinde- ĵoj estas turisma loko fama tra Ĉinio kaj la mondo. Shouxi-

lago kun areo de pli ol 30 hek- taroj longas je 4.3 kilometroj. Apud ĝi lokiĝas antikvaj kons- truaĵoj kiaj Jin-monteto, fiŝho- kejo, Wuting-ponto, la Blanka Pagodo, kiuj enkorpiĝas en si ĝardenistikon de suda kaj norda Ĉinio. La vidindaĵoj allogas al si turistojn per la harmonia aranĝo.

La Blanka Pagodo konstruiĝis en Qing-dinastio kaj havas his- torion de pli ol 200 jaroj. Ĝi similas al la lamaisma Blanka Pagodo de Beihai-parko en Pe- kino. La legendo diras, ke iufoje imperiestro Qianlong vojaĝis en Yangzhou kaj demandis al lokaj oficistoj, ĉu tie troviĝas blanka pagodo simila al tiu en Pekino. La akompanantaj komercistoj respondis senpense: "Jes." Aŭ- dinte tion, Qianlong intencis vi- ziti ĝin en la sekvonta tago Efektive tiam en Yangzhou ne estis tia pagodo. Timante esti

La Granda Kanalo trafluas Yangzhou.



senkapigitaj pro trompo al la imperiestro, la komercistoj konstruigis falsan blankan pagodon per salsakoj en tiu punkto por akcepti lin. Post kiam Qianlong foriris, ili konstruigis la Blankan Pagodon el brikoj.

Wuting-ponto havas 15 spandojn. Sur ĝi staras kvin kioskoj, el kiuj la meza estas iom pli alta en la centro de la ponto. Iliaj tegmentoj estas kovritaj per flavaj glazuritaj tegoloj. Ĉiuj kioskoj kun koloraj desegnaĵoj havas karmezinajn kolonojn kaj blankajn marmorajn balustradojn. Nokte la luno speguliĝas en akvo sub ĉiu spando, kio donas apartan ĉarmon.

Daming-templo kun historio de ĉ. 1500 jaroj sidas sur la monteto de la nordokcidenta antaŭurbo de Yangzhou. Ĝi estas unu el la antikvaj temploj de Yangzhou. Antaŭ la templo staras antikva portalo, ĉirkaŭ kiu kreskas altaj antikvaj arbegoj. En la templo sin trovas silda statuo de dika budho Majtrejo, kiu aspektas tre afabla kaj ĝojplena.

La famkonata Pingshan-halo sidas en la templo. Ĝi konstruiĝis en 1048 p. K., kiam Ouyang Xiu, fama literaturisto de Song-dinastio, funkciis kiel gubernatoro de Yangzhou. Starante antaŭ la halo oni povas vidi senliman ebenaĵon sude kaj la brilantan Jangzi-riveron malproksime.

La Memorhalo de Jianzhen sidas en la orienta parto de la templo. Antaŭ la memorhalo estas kvietkorto, ambaŭflanke de kiu staras lignaj koridoroj. En la halo estas metita ligna silda statuo de bonzo Jianzhen, farita imite al tiu de la templo Toshiodai de Nara de Japanio.

Jianzhen (688-763 p. K.) naskiĝis en Yangzhou en Tang-

dinastio. En sia infaneco li bonziĝis kaj en sia mezaĝo funkciis kiel abato de Daming-templo. Li posedis riĉajn sciojn pri literaturo, arto, medicino kaj arkitekturo. En la jaro 743 p. K. Jianzhen akceptis la inviton de la japanaj senditoj-bonzoj kaj decidis veturi al Japanio por fari predikadon kun siaj disĉiploj, metiistoj kaj artistoj. Dum dek jaroj li kvinfoje malsukcesis en la transveturado al Japanio pro malfacilaj kondiĉoj. En la kvina transveturado li perdis vidkapablon pro la troa laciĝo dum la longa vojaĝo. Sed tio ne ŝancelis lian firman volon. En la jaro 753 li sukcese faris la sesan transveturadon. En Japanio li vivis dek jarojn kaj en sia 76-jaraĝo mortis de malsano en Nara. Li ludis rolon en antaŭenpuŝado de la kulturo de la Nara-epoko de Japanio. En Japanio li kaj liaj disĉiploj konstruis la grandiozan templon Toshiodai, enkondukis tien la skulpturon, presarton kaj medicinon de Ĉinio.

Por memori pri bonzo Jianzhen, la pioniro de la kultura interŝanĝo de la popoloj de Ĉinio kaj Japanio, la budhismaj kaj kulturaj rondoj de la du landoj faris solenan memoraktivadon en Yangzhou en 1963, okaze de la 1200-a datreveno de la forpaso de Jianzhen, kaj decidis konstrui memorhalon de Jianzhen. En 1973 la memorhalo estis finkonstruita.

Yangzhou famiĝas tra la mondo ankaŭ pro siaj ĉarmaj ĝardenoj. Geyuan-parko allogas al si vizitantojn per artefaritaj montetoj, kiuj konsistas el diverskoloraj ŝtonoj de multaj famaj montoj. Heyuan-parko karakteriziĝas per diversformaj kioskoj kaj ringokoridoroj en kontrasto de koloroj.

La historiaj objektoj de Yangzhou interesas nemalmultajn literaturistojn kaj kaligrafojn, ekzemple, poetoj Li Bai, Bai Juyi, Liu Yuxi kaj Du Mu de Tang-dinastio skribis poemojn pri ili. Ĉefministro Wang Anshi, literaturistoj Ouyang Xiu kaj Su Dongpo de Song-dinastio venis tien por plenumi sian oficon aŭ sin plezurigi. Estas pli menciinde, ke la familio de Cao Xueqin, la aŭtoro de la ĉina klasika novelo «Songo de Buduaro», havis intiman rilaton kun Yangzhou. Oni nomas ĝin la dua hejmloko de Xueqin. Laŭ historiista esplorado, multaj medioj kaj personoj de «Songo de Buduaro» estis ĉerpitaj el Yangzhou.

En Qianlong-epoko (1736-1796) de Qing-dinastio ok pentristoj de Yangzhou estis nomataj ok stranguloj de Yangzhou, ĉar iliaj pentraĵoj superis tiujn de aliaj pentristoj en pentrostilo, kiu rompis malnovajn rutinojn de «ortodoksaj» pentristoj. Iliaj verkoj havis grandan influon sur la disvolviĝon de la ĉina pentrarto.

Yangzhou abundas je tradiciaj metiartaĵoj, ekzemple, elegantaj lakaĵoj, delikataj jadskulptaĵoj kaj belaj papertondaĵoj, kiuj profunde impresas turistojn.



La pitoreska regiono

XIANNING

de LI CHUNGENG

LA regiono Xianning estas nova turisma loko. Ĝi situas en la suda parto de Hubei-provinco kaj ĉe la suda bordo de Jangzi-rivero. La Pekin-Kantona Fervojo transpasas ĝian okcidentan parton. Tial ĝi havas facilan trafikon.

La loko estas monteta regiono abunda je densaj bambuoj, arbaroj kaj akvejoj. La klimato estas agrabla. Krome, tie dislokiĝas termofontoj kaj historiaj vidindejoj, abundas lokaj produktaĵoj. Ĉio ĉi faris ĝin agrabla loko por turistoj.

LA URBETO WENQUAN

La urbeto Wenquan estas sidejo de la registaro de la regiono Xianning, pli ol 80 kilometrojn for de Wuhan, ĉefurbo de la provinco, en nordo. La urbeto konstruiĝis en 1956 kaj nun tie vivas pli ol 20 000 loĝantoj. Modestaj kaj belaj domoj staras unuj post aliaj sur montodeklivoj. Vicoj post vicoj da verdaj arboj komplete ombris la tutan urbeton.

Preter la urbeto fluas rivereto. En ĝi estas multaj termofontoj,


kies temperaturo povas atingi maksimume 70°C. Tial la urbeto ricevis la nomon Wenquan, kiu signifas "termofonton" en la ĉina lingvo. Antaŭ kelkaj jaroj oni konstruis termofontajn banejojn, por ke loĝantoj kaj turistoj tie sin banu kaj kuracu. Tuj ĉe

la riverbordo sur la montodeklivo staras hotelo kun termofontaj banejoj ene. La hotelo estas komforta en kvieta medio. Antaŭ la hotelo vojeto kondukas al la Tigra Roko, la kulmino de la urbeto. Starante sur la roko, oni povas vidi verdajn montojn unuj post aliaj kaj antaŭ si la tutan urbeton.

OSMANTOJ KAJ VERDAJ BAMBUOJ

Proksime al la urbeto Wenquan estas la komunumo Osmanto. Tie ĉiuj familioj kulturas osmantojn. Oni diris, ke la komunumo kulturas pli ol 200 000 osmantarbojn. En aŭtuno la osmantoj elspiras bonodoron, kiun oni povas flari eĉ de tre malproksime. Komunumanoj starigas tendojn sub arboj, plukas osmantojn, kantante popolkantojn, kio ofte ravas la turistojn.

Flosigado de bambuoj



Laŭ la historiaj notoj tie la osmantoj estis kultivitaj jam antaŭ ĉ. 400 jaroj. Tie troviĝas iu osmantarbo, kiu aĝas pli ol 120 jarojn. En la pasintaj pli ol 30 jaroj 50-oble plimultiĝis la nombro de osmantarboj. La trinkaĵoj kaj manĝaĵoj preparitaj per osmantoj, kiaj vinoj, teoj, kukoj, marmelado k. a., estas tre ŝatataj de turistoj en- kaj eksterlandaj, kaj per tio la tiea popolo ĉiujare enspezas centmilojn da juanoj.

De la urbeto Wenquan oni povas veturi al la proksima popola komunumo Huawen por rigardi bambuaron. Estas aparte agrable traveturi per plezuraŭto bambuan maron kun pli ol 7 000 hektaroj.

La vilaĝanoj konstruas domojn per bambuoj kaj faras el ili ĉiutagajn bezonaĵojn kaj metiartaĵojn, kiaj bambua kurteno, plumujo, te-skatolo, librobreto, plektaĵo ktp. Krome, oni preparas bongustajn pladojn el bambuaj ĝermoj. Estas interese, ke komunumanoj lerte prezentas en la bambuaro "transsaltadon". Por stuci bambuon aŭ forigi neĝon sur ĝia supro la tieaj komunumanoj ofte devas grimpi sur la supron. Sed la grimpadado estas tro peniga. Tial la junuloj lertigis sin en transsalto de unu bambua supro al alia per facila eksalto.

LA ANTIKVA BATALEJO ĈE CHIBI

La kampanjo Chibi estis fama en la ĉina antikveco okazinta ĉe la monto Chibi nordokcidente de la gubernio Puqi en la regiono Xianning. La larĝa Yangzi-rivero preterfluas norde de la monto, kiu etendiĝas al la rivermezo kaj havas gravan strategian pozicion. En la lastaj jaroj de la Orienta Han-dinastio (25-

220 p. K.), post kiam militaristo Cao Cao unuigis nordan Ĉinion, li komandis 200 000 soldatojn kaj militiris suden en 208 p. K. Alia militaristo Sun Quan en la sudo kaj parenco de Han-dinastio Liu Bei organizis aliancan armeon kun 50 000 militistoj por rezisto. Ili decidis ataki per fajro la surakvajn trupojn de Cao Cao. En la atako ĉiuj militŝipoj de Cao Cao rapide brulegis sur la rivero larĝa je 4 km. La rokoj de la suda bordo ruĝiĝis de prilumado kaj pro tio ricevis la nomon Chibi (en la ĉina lingvo Chibi signifas "ruĝa muro"). Poste oni gravuris sur kruta rokego du okulfrapajn ĉinajn ideografiaĵojn "Chi Bi". Sur la montsupro staras kiosko. Oni diris, ke ĝi estas la loko, kie ĉefgeneralulo Zhou Yu de Sun Quan kaj ĉefa konsilisto Zhuge Liang de Liu Bei siatempe observis la trupojn de Cao Cao. Zhuge Liang poste fariĝis fama politikisto kaj strategiisto en la periodo de la Tri Regnoj (220-265). Proksime de la kiosko oni starigis templon por memorigi pri li. En ĝi nun montriĝas pli ol 1 000 historiaj objektoj elterigitaj en la lastaj jaroj.


JIUGONG-MONTO KAJ LA MAŬZOLEO DE LI ZICHENG

Jiugong-monto kaj la Maŭzoleo de Li Zicheng ambaŭ troviĝas en la gubernio Tongshan de la regiono Xianning. Jiugong-monto estas alta pli ol 1 500 metrojn super la marnivelo. Post kiam taoistoj konstruigis tie templon en 1187, ĝiaj religiaj incensoj brulis ĉ. 700 jarojn. Kaj la templo fariĝis unu el la kvin grandaj taoismaj temploj de Ĉinio. Estas domaĝe, ke antaŭ cent jaroj la templo estis difektita kaj ne plu venis tien taoismaj kredantoj.

Tamen Jiugong-monto daŭre allogas al si multe da turistoj per sia ĉarma pejzaĝo kaj agrabla klimato. Tie kreskas multaj specoj de plantoj kaj pli ol 200 specoj de drogherboj. El la raraj arboj estas skuiĝema pino. Se nur turisto facile skuas ĝian branĉon, la tuta arbo ekskuiĝas.

Sur la monteto Niuji ĉe la montpiedo kuŝas la Maŭzoleo de Li Zicheng, gvidanto de la kamparana insurekcia armeo en la lastaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644). La insurekcia armeo sub lia komando militiris dekkelkajn jarojn, kaj fine konkeris Pekinon, renversis Ming-dinastion. Sed li ebriiĝis de la venko kaj neglektis la minacon de la potencaj armeoj de Qing-dinastio ekster la Granda Muro. Poste li devigite forlasis de Pekino suden kaj atingis Jiugong-monton. Atakate de la armeoj de Qing-dinastio kaj tiuj de la bienuloj, li malvenkis kaj estis mortigita en sia 39-jara aĝo. Lia maŭzoleo okupas areon de 8 000 kvadrataj metroj, ĝi havas arkajn pordojn, steleon, kultan altaron, tombejon kaj memorhalon. En la memorhalo montriĝas bildoj pri lia vivo kaj fotoj pri la koncernaj historiaj objektoj. Post riparado la maŭzoleo estas malfermita al turistoj. Dum la turisma sezono venas tien aro post aro da vojaĝantoj.








Vojo kondukanta al la monto Jiugong

Pejzaĝoj de Xianning

Fotoj de LI CHUNGENG


La lago Tianchi sur la supro de la monto Jiugong





Boatoj veturantaj preter verda bambuaro

Akvedukto en Xianning



**FOTOJ FARITAJ
DE E-ISTOJ**


Fuji-monto

de **KENZEN MINAMI**

(Japanio)



**KOKAĴAJ KUBOJ
KUN TERNUKSAJ
GRAJNOJ**



Ĉinaj pladoj

POR AKIRI PLI DA PROTEINO

—Vizito al kulturejoj de marproduktaĵoj en Fujian-provinco

KIEL konate, proteino estas la plej grava konsistaĵo de la vivantaj korpoj, la bazo de la vivo. Sed, eble ne ĉiuj scias, ke la konkuloj kaj algoj, vivantaj en la maro malpli ol 10 metrojn profunda kaj marbordaj etendaĵoj, estas grava fonto de proteino por la homaro. Ekzemple, la sekigita karno de la konkuloj enhavas proteinojn je pli ol 60%, la sekigita karno de ostro kaj aliaj similaj moluskoj je 50-60%, kaj la sekigita porfiro (*Porphyra*) je 24.5%. Ili ĉiuj estas pli riĉaj je proteino ol kokovo.

Antaŭ nelonge mi vizitis la

marbordan provincon Fujian en sudorienta Ĉinio. Same kiel aliaj marbordaj provincoj de Ĉinio, Fujian rapide disvolvas kulturaĵojn de marproduktaĵoj, kaj rezulte de tio, la areo de la kulturejoj en 1982 atingis 26 700 hektarojn, kiuj okupas ĉ. kvaronon de la tuta utiligebla marsurfaco de la provinco. La totala kvanto de la marproduktaĵoj en 1982 atingis 115 000 tunojn.

DISVOLVI PRODUKTADON PER ĈIUJ FORTOJ

Iutage mi venis al la marborda Lianjiang-gubernio. Starante sur

la alta mardigo, mi vidis, ke multaj homoj laboras en spegulbrila malprofunda maro dividita en kradoj. Tie iuj enbatis palisojn kaj ŝtonkolonojn por kulturi ostrojn, aliaj fiksis palisojn kaj retojn por kulturi laminariojn kaj porfirojn, kaj la triaj semis idojn de konkuloj en kotoplana bordetendaĵo.

Lin Jinping, vicestro de la Akvoproduktaĵa Buroo de la provinco, akompanis min en la vizito. Li diris al mi ke la metodo bredi konkulojn kaj algojn estas simpla. Ekzemple, nur se oni fiksis la idojn de la akvoŝataj ostroj sur ŝtonkolonojn, oni povas rikolti ilin post 1 aŭ 2 jaroj. La klamo, tridakno kaj aliaj moluskoj ŝatas vivi en kotoplana bordetendaĵo. Oni povas rikolti ankaŭ ilin 1-2 jarojn post la semado. Ili ne bezonas nutradon kaj mem asimilas planktonon en la marakvo. En iuj lokoj, por akceli kreskadon de laminarioj, porfiroj kaj aliaj, oni devas meti moderan kvanton da kemisterko. Post rikolto oni unue sekigas ilin kaj poste vendas. Nun, la specoj de konkuloj kaj algoj kulturataj en Fujian-provinco jam plimultiĝis de pli ol 10 en 1979 al pli ol 20. Ili plejparte estas nutreriĉaj. Iuj el ili servas kiel bonaj manĝaĵoj, drogo kaj materialoj por industrio kaj metiarto, kaj la aliaj post prilaborado estas uzataj kiel nutraĵoj por kortobirdoj kaj brutoj.

Kokajaj kuboĵ kun ternuksaj grajnoj

Materialoj:

koka femuraĵo	400 g.
ternuksaj grajnoj	100 g.
lardo	50 g.
trapa aŭ alispeca amelo	50 g.
sojo	15 g.
vinagro	5 g.
blanka sukero	10 g.
sekaj kapsikoj	3
pipro-grajnoj	10
ovoblanko	de unu ovo
ŝenoprazaj, zingibraj kaj ajlaj pecoj	10 g.
apetita pulvoro	5 g.

Preparado:

1. Tranĉu la kokan femuraĵon en 0.5-colajn kuboĵn. Senŝeligu la ternuksajn grajnoj. Tiam la plado estas

sikojn kaj tranĉu ilin en unu-colajn pecojn.

2. Varmigu paton kaj enverŝu lardon. Fritu la ternuksajn grajnoj, ĝis ili fariĝas maĉkrakaj. Revarmigu la paton kaj kirle fritu la ŝenoprazajn, zingibrajn kaj ajlajn pecojn kaj la pipro-grajnoj. Elprenu ilin, kiam ili ekdonas bonodoron. Metu en la paton la tranĉitajn sekajn kapsikojn kaj poste la kokajajn kuboĵn miksitajn kun ovoblanko por friti, ĝis la kuboĵ paliĝas. Aldonu spicaĵojn kaj refritu por momento. Densigu per trap-amela likvaĵo kaj surverŝu vinagron. Miksu kun frititaj ternuksaj grajnoj. Tiam la plado estas preta.

Fujian-provinco havas longan marbordan linion kaj vastan marteritorion. La klimato kaj geografia medio tre taŭgas por kreskado de multspecaj maraj vivaĵoj. En 1980 la provinca registaro praktikis la politikon, ke privatuloj povas kulturi la marproduktaĵojn krom la ŝtataj entreprenoj kaj kolektivoj. Al ili oni racie dividis la marsurfacon kaj difinis rajtojn por uzi. La registaro garantias la uzatan areon de la ŝtataj entreprenoj kaj la kolektivoj kaj faras kontraktojn kun ili pri la produktaj normoj, kaj la plejparto de la superplenumita kvanto apartenas al la produktantoj. Sub la unuigita plano de la produktaj brigadoj, privatuloj povas ekspluati ankoraŭ ne ekspluatitajn marbordajn etendaĵojn aŭ akcie fari tion. Krome, la komunumanoj povas ricevi sian porcion de marpeco por mem uzi.

Tiu produkta politiko ne nur ebligas al la miljare dormanta maro ekspluatadon kaj utiligadon, sed ankaŭ laborigas la superfluaĵajn laborfortojn en la urbo kaj kamparo. Nun entreprenas la kulturadon kelkcent mil kamparanoj en 26 gubernioj kaj urboj de tiu provinco. Ekzemple, 162 loĝantoj de 33 familioj en la tria taĉmento de Longtian-brigado de Fuding-gubernio, ĉiuj faras kulturadon en la maro, escepte de maljunuloj, malfortuloj, malsanuloj kaj kripluloj. La pokapa enspezo plimultiĝis de 121 juanoj en 1977 al 635 juanoj (egale al 320 usonaj dolaroj) en 1982. La malriĉa 6-membra familio de Lin Suozheng en 1982 kulturis ostrojn sur 1.3 hektaroj da marborda etendaĵo kaj enspezis pli ol 6 000 juanojn. Krom kvitigi sin de la multjara ŝuldo, li ankaŭ konstruis novan domon.

SUB SCIENCA DIREKTO

Oni diris al mi, ke alia kaŭzo de la pli rapida disvolviĝo de la afero en Fujian-provinco estis aplikado de scienca kaj teknika atingoj. Mi informiĝis, ke tie funkcias scienc-esploraj organizaĵoj en niveloj de provinco, gubernio, komunumo kaj en brigado. En la lastaj jaroj, la provinco akiris pli ol 10 ŝtatajn premiojn pro sukcesoj en kulturado de la marproduktaĵoj. En 1981 Fuqing-gubernio, riĉa je "buntaj mituloj", ricevis 4 premiojn de la ŝtato kaj la provinca registaro pro sukcesoj en la scienc-esplorado.

En la pasintaj jaroj, la sciencaj kaj teknikaj laborantoj plurfoje faris esploradojn pri generado de la marproduktaĵoj. Antaŭe, por generi ilin oni ofte kaptis iliajn idojn en la maro, tial la vivipova

En flegejo de porfiro



proporcio estis malalta. Post esplorado oni sukcese elkulturis idojn de laminario, porfiro, ostro kaj aliaj, sume kelkdek specojn. Estas ĝojige, ke la polanoj mem fondis idogenerajn kulturejojn ekipitajn per mikroskopo.

Dank' al disvastigo de avangardaj teknikoj, multe altiĝas la produktokvanto de la marproduktaĵoj. Ekzemple, Fuding-gubernio en 1982 starigis rekordon en la produktokvantoj de laminarioj kaj algoj.

MALFERMI VOJON AL KOMERCO

En la vizitado mi demandis vicedron Lin: "Kiel oni faras, kiam la rikolta kvanto de la freŝaj marproduktaĵoj draste kreskas kaj ĉiuj volas ilin vendi en la foiro?" Li diris, ke en la pasinteco la marproduktaĵoj de Fujian-provinco estis monopoligitaj

de la Ŝtata Komerca Kompanio de la Akvoproduktaĵoj. Tio kaŭzis al la foiro streĉitecon de liverado kaj samtempe grandkvantan superstokadon de la produktaĵoj en la tenejoj. La produktantoj suferis grandan ekonomian perdon. En la lastaj jaroj oni ŝanĝis tian sistemon kaj malfermis multajn kanalojn por komercado.

Nun la merkato estas en granda prospero. Antaŭe, Fuding-gubernio ĉiujare produktis 750 tunojn da konkuloj, sed ili multe stokiĝis en la tenejoj. Depost 1979, kiam la registaro permesis al individuoj longdistanca komercado, la konkuloj ekhavis grandan debiton. En 1982 la gubernio produktis 1 350 tunojn da konkuloj kaj ilin rapide forvendis. Tial, nun ilin povas aĉeti ne nur proksimaj urbanoj, sed ankaŭ komunumanoj de foraj montregionoj.

En Fujian-provinco cirkulas jena rakonto: Por helpi la komunumon, produktajn brigadojn kaj la komunumanojn vendi porfirojn, junaj komunumanoj Teng Shengtu kaj Chi Baochao fondis marproduktaĵ-vendan grupon kune kun aliaj dekelkaj junuloj. En du jaroj ili vizitis dekelkajn provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn inkl. de Heilongjiang, Interna Mongolio, Qinghai kaj Guangdong, kaj vendis pli ol 150 tunojn da porfiroj.

La disvolvo de kulturado de marproduktaĵoj en Fujian-provinco ne nur havigas al la kulturistoj pli da enspezo, sed ankaŭ riĉigas la manĝotablojn por urbanoj kaj kamparanoj. Oni povas antaŭvidi, ke la popolo de Fujian-provinco certe akiros pli grandan sukceson en produktado de marproduktaĵoj kaj liveros al ni pli da proteino.

Konkulo-bredejo en Lianjiang-gubernio, Fujian-provinco



Fujian-provinco havas longan marbordan linion kaj vastan marteritorion. La klimato kaj geografia medio tre taŭgas por kreskado de multspecaj maraj vivaĵoj. En 1980 la provinca registaro praktikis la politikon, ke privatuloj povas kulturi la marproduktaĵojn krom la ŝtataj entreprenoj kaj kolektivoj. Al ili oni racie dividis la marsurfacon kaj difinis rajtojn por uzi. La registaro garantias la uzatan areon de la ŝtataj entreprenoj kaj la kolektivoj kaj faras kontraktojn kun ili pri la produktaj normoj, kaj la plejparto de la superplenumita kvanto apartenas al la produktantoj. Sub la unuigita plano de la produktaj brigadoj, privatuloj povas ekspluati ankoraŭ ne ekspluatitajn marbordajn etendaĵojn aŭ akcie fari tion. Krome, la komunumanoj povas ricevi sian porcion de marpeco por mem uzi.

Tiu produkta politiko ne nur ebligas al la miljare dormanta maro ekspluatadon kaj utiligadon, sed ankaŭ laborigas la superfluaĵajn laborfortojn en la urbo kaj kamparo. Nun entreprenas la kulturadon kelkcent mil kamparanoj en 26 gubernioj kaj urboj de tiu provinco. Ekzemple, 162 loĝantoj de 33 familioj en la tria taĉmento de Longtian-brigado de Fuding-gubernio, ĉiuj faras kulturadon en la maro, escepte de maljunuloj, malfortuloj, malsanuloj kaj kripluloj. La pokapa enspezo plimultiĝis de 121 juanoj en 1977 al 635 juanoj (egale al 320 usonaj dolaroj) en 1982. La malriĉa 6-membra familio de Lin Suozheng en 1982 kulturis ostrojn sur 1.3 hektaroj da marborda etendaĵo kaj enspezis pli ol 6 000 juanojn. Krom kvitigi sin de la multjara ŝuldo, li ankaŭ konstruis novan domon.

SUB SCIENCA DIREKTO

Oni diris al mi, ke alia kaŭzo de la pli rapida disvolviĝo de la afero en Fujian-provinco estis aplikado de scienca kaj teknika atingoj. Mi informiĝis, ke tie funkcias scienc-esploraj organizaĵoj en niveloj de provinco, gubernio, komunumo kaj en brigado. En la lastaj jaroj, la provinco akiris pli ol 10 ŝtatajn premiojn pro sukcesoj en kulturado de la marproduktaĵoj. En 1981 Fuqing-gubernio, riĉa je "buntaj mituloj", ricevis 4 premiojn de la ŝtato kaj la provinca registaro pro sukcesoj en la scienc-esplorado.

En la pasintaj jaroj, la sciencaj kaj teknikaj laborantoj plurfoje faris esploron pri generado de la marproduktaĵoj. Antaŭe, por generi ilin oni ofte kaptis iliajn idojn en la maro, tial la vivipova

En flegejo de porfiro



proporcio estis malalta. Post esplorado oni sukcese elkulturis idojn de laminario, porfiro, ostro kaj aliaj, sume kelkdek specojn. Estas ĝojige, ke la polanoj mem fondis idogenerajn kulturejojn ekipitajn per mikroskopo.

Dank' al disvastigo de avangardaj teknikoj, multe altiĝas la produktokvanto de la marproduktaĵoj. Ekzemple, Fuding-gubernio en 1982 starigis rekordon en la produktokvantoj de laminario kaj algoj.

MALFERMI VOJON AL KOMERCO

En la vizitado mi demandis vicedron Lin: "Kiel oni faras, kiam la rikolta kvanto de la freŝaj marproduktaĵoj draste kreskas kaj ĉiuj volas ilin vendi en la foiro?" Li diris, ke en la pasinteco la marproduktaĵoj de Fujian-provinco estis monopoligitaj

de la Ŝtata Komerca Kompanio de la Akvoproduktaĵoj. Tio kaŭzis al la foiro streĉitecon de liverado kaj samtempe grandkvantan superstokadon de la produktaĵoj en la tenejoj. La produktantoj suferis grandan ekonomian perdon. En la lastaj jaroj oni ŝanĝis tian sistemon kaj malfermis multajn kanalojn por komercado.

Nun la merkato estas en granda prospero. Antaŭe, Fuding-gubernio ĉiujare produktis 750 tunojn da konkuloj, sed ili multe stokiĝis en la tenejoj. Depost 1979, kiam la registaro permesis al individuoj longdistanca komercado, la konkuloj ekhavis grandan debiton. En 1982 la gubernio produktis 1 350 tunojn da konkuloj kaj ilin rapide forvendis. Tial, nun ilin povas aĉeti ne nur proksimaj urbanoj, sed ankaŭ komunumanoj de foraj montregionoj.


En Fujian-provinco cirkulas jena rakonto: Por helpi la komunumon, produktajn brigadojn kaj la komunumanojn vendi porfirojn, junaj komunumanoj Teng Shengtu kaj Chi Baochao fondis marproduktaĵ-vendan grupon kune kun aliaj dekelkaj junuloj. En du jaroj ili vizitis dekelkajn provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn inkl. de Heilongjiang, Interna Mongolio, Qinghai kaj Guangdong, kaj vendis pli ol 150 tunojn da porfiroj.

La disvolvo de kulturado de marproduktaĵoj en Fujian-provinco ne nur havigas al la kulturistoj pli da enspezo, sed ankaŭ riĉigas la manĝotablojn por urbanoj kaj kamparanoj. Oni povas antaŭvidi, ke la popolo de Fujian-provinco certe akiros pli grandan sukceson en produktado de marproduktaĵoj kaj liveros al ni pli da proteino.

Konkulo-bredejo en Lianjiang-gubernio, Fujian-provinco



Naturparkoj de Ĉinio



Picea arbaro

STARANTE sur alta montsupro mi rigardas malproksimen per binoklo: En brilanta lago petolas aro kaj aro da cignoj kaj iuj ripozas sur borda herbejo. La loko estas la naturparko Bayanbulak, ĉirkaŭ kiu staras neĝkovritaj montpintoj de Tianshan-montaro. Printempe alflugas cignaroj de la sudo kaj tie vivas kaj generas siajn idojn. En la profunda aŭtuno ili reflugas suden. En 1981 la popola registaro de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono starigis tie la naturparkon. Kvankam oni ne povas iri en la marĉon por esplori la birdojn, tamen laŭtakse ĉiujare almenaŭ dumil cignoj pasigas tie printempon, someron kaj aŭtunon.

En la lastaj jaroj plimultiĝis la naturparkoj de birdoj en Ĉinio. En la gubernio Pingnan, Fujian-provinco de sudorienta Ĉinio, la

loka registaro fondis la naturparkon de ambirdoj (*Aix galericulata*) propraj al Ĉinio. Tie rivereto murmuras en ravino kaj vintre vivas pli ol mil ambirdoj. En la provincoj Heilongjiang kaj Jilin de nordorienta Ĉinio stariĝis tri grandareaj naturparkoj de ruĝvertaj gruoj kaj en suda Ĉinio oni malfermis naturparkon por travintrado de tiaj birdoj. En la apudmara Rizhao-gubernio de la provinco Shandong oni starigis naturparkon de grizaj pigoj, kiuj protektas tie la ruĝajn pinojn dum jarcentoj.

En Ĉinio troviĝas multaj naturparkoj de raraj bestoj. En Sichuan-provinco mi vizitis la naturparkon de la grandaj pandoj. En la tre malproksima antikveco ili aktivadis en la vastaj regionoj de Birmo ĝis Pekino, sed nun vivas nur en bambuaroj en la nordaj kaj okcidentaj mon-

taroj de Sichuan-provinco kaj sudaj montaroj de Shaanxi- kaj Gansu-provincoj. Ankaŭ orharaj simioj estas raraj bestoj. Nun Ĉinio jam starigis kelkajn naturparkojn por tiaj belaj primatoj.

Por protekti rarajn akvovivaĵojn, oni starigis la naturparkon de amfioksoj en la maro ĉe Xiamen de Fujian-provinco, naturparkon de tiaj vivaĵoj unikan en la mondo. Tiuspeca besteto tre malgranda kiel alumeto kaj tutkorpe travidebla surdorse kun ĥordo estas prapatro de la fiŝoj. Ĝi vivas en sablo kovrita de marakvo. La naturparko de onkorhinko, fama specio de la salmedoj, jam estas starigita en du riveroj de Heilongjiang-provinco, kie ili demetas fraĵojn.

En la ĉina tropika zono de la provincoj Yunnan, Guangdong, Guangxi kaj Fujian, fondiĝis

nombro da naturparkoj de tropikaj arbaroj. Ekz. en la baseno de la Okcidenta Rivero en Guangdong-provinco troviĝas tri larĝ-foliaj arbaroj. Sur la dekkelk-kilometra apudmara sabla zono de la insulo Hainan kreskas altaj driobalanopoj (*Dryobalanops aromatica*). Ilia ligno estas malmola kaj akvoimuna, tial ĝi estas altklasa ligno por ŝipkonstruo. Nun oni esploras la kaŭzon de la malofta fenomeno, kial tiaj arboj povas kreski sur marborda sablejo. Ankaŭ la mallarĝa driobalanopa zono estas difinita kiel naturparko.

La montaro Changbai okupas tre okulfrapan lokon en la ĉinaj arbaraj naturparkoj. Ĝia naturparko stariĝis en la 50-aj jaroj kaj nun estas unu el la esploraj centroj de la internacia organizo Homo kaj Biosfero. Ĉinaj zoologoj, botanikistoj kaj geografoj faris plurjaran esploron en tiu loko, kie vivas kaj kreskas miloj da specoj da sovaĝaj animaloj kaj vegetaĵoj, inkl. de ĉ. 800

drogherboj. La grandaj tigroj de la Nordoriento vivas ankaŭ en tiuj montaroj. Ili ofte sekvas aprojn por formanĝi la postiĝintan. En ĝiaj montvaloj altaj je 800 metroj super la marnivelo prosperas "belulino-pinoj", kiuj formas gigantajn belajn arbarojn kaj allogas multajn botanikistojn.

La primitivaj piceoj kaj abioj en la naturparko de Changbaimontaro estas tre ĉarmaj. Ili staras pompe unuj super aliaj kvazaŭ kvin generaciuloj. La altaj arboj, kvazaŭ praavoj, estas ĉirkaŭataj de siaj posteuloj kun malsamaj alteco kaj dikeco, dum la plej junaj arboj apenaŭ elteriĝis.

En Ĉinio la plej altaj picearoj sin trovas en la okcidenta parto de Tianshan-montaro. Tie la plej junaj piceoj altas je 20-30 metroj kaj la plenkreskaj je 40-50 metroj, inter kiuj multaj eĉ havas altecon de 60-70 metroj. Escepte de tiu loko oni ankoraŭ ne tro-

vis tiel altajn picearojn en la aliaj partoj de la mondo. Ilin povas kompari nur iuj specioj de driobalanopoj en la tropika zono. Per aparta rimedo tiuj piceoj generas siajn posteulojn. La dikaj tavoloj de pinglo-folioj surtere akumulitaj dum jarmiloj malhelpas la kontakton de la arbaj semoj al la grundo, pro kio la putra picea ligno fariĝis vera patrino de la junaj piceoj. Kiam mi atingis tien, mi propraokule vidis, ke multe da arbidoj kreskas sur falintaj gigantaj piceoj putraj.

Inter pinacoj troviĝas kataĵo (*Cathaya argyrophylla*), kies malkovro mirigis la internaciajn botanikistajn rondojn. Ĝi kreskas malrapide, maksimume dek metrojn en daŭro de 200 jaroj. En la suno brilas du blankaj stomaj strioj sur la dorso de ĝiaj folioj. Antaŭ dekoj da milionoj da jaroj, sur multaj montoj sur la terглоbo kreskis tiaj plantoj, kiuj pereis post la kvaternara glacirivero. La fakuloj povas es-

Cignino kun siaj idoj



PENTRAĴOJ DE KAMPARANOJ DE JINSHAN



“Mi pentras tion, kion mi ŝatas, aŭ tion, kio venis en mian kapon. . .”

“Mi ĝuas grandan plezuron, kiam mi pentras. Iam mi eĉ ekridis dum pentrado, kvazaŭ mi revenus al mia infaneco. . .”

“Mi pentras ion realan laŭ mia imago, alie la bildo aspektas ne ĉiam belvida. . .”

Jen kelkaj kampanoj diris sian sperton en pentrado.

Jinshan-gubernio sudokcidente de Ŝanhajo estas bela loko. Tie sur la brikaj fornoj de ĉiuj familioj estas desegnitaj floroj kaj herboj kun liberaj kaj facilaj strekoj. Ĉie troviĝas lignaj litoj kun tradiciaj gravuraĵoj, denskoloraj novjaraj lignogravuraĵoj kaj interesaj popolaj ludiloj. La tieaj virinoj, ĉu junaj, ĉu maljunaj, estas lertaj en brodado kaj papertondado, la figuroj kaj koloroj de iliaj metiartaĵoj havas sian originalecon.

En la lastaj jaroj aperis pentrovarmo ĉe kampanoj de Jinshan. Ili asimilis riĉan nutraĵon el la tradicia popola arto en la regiono sude de Jangzi-rivero, kuraĝe faris artan troigon per romantika imago kaj kreis sian propran stilon karakterizitan per originala komponaĵo, modesta figuro, riĉa enhavo, densaj kaj klaraj koloroj. Iliaj pentraĵoj estis ekspoziciataj en Pekino kaj aliaj ĉinaj urboj kaj en iuj eŭropaj kaj amerikaj landoj, kaj alte

plori nur iliajn fosiliojn. En la 60-aj jaroj de la nuna jarcento ĉinaj botanikistoj trovis tiujn rarajn plantojn unue sur alta monto en la Guangxi-a Ĝuangnacieca Aŭtonoma Regiono kaj poste en aliaj provincoj de suda Ĉinio. Nun ni havas du naturparkojn de tiaj plantoj.

En Xinjiang troviĝas la plej granda naturparko de Ĉinio, t.e. la naturparko de hufuloj en la monto Kalamaili. Tie vivas ĉefe kiangoj, raraj bestoj protektataj de la ŝtato. Nun nur en tiu loko

en la mondo ankoraŭ vivas centoj da kiangoj. La protekto ebligas al tiuspecaj bestoj daŭran ekziston sur la terglobo. La naturparko okupas areon de 1 700 000 hektaroj, kiu estas kvaroblo de la totala areo de la du naturparkoj Changbai-montaro kaj Wolong.

La plej malgranda naturparko en nia lando estas tiu de Leshan en la gubernio Nanjing, Fujian-provinco. Ĝi okupas areon de nur dekkelkaj hektaroj. Ĝi tamen havas altan akademian valoron.

Tie konserviĝas ekologia medio de tropika arbaro de la suda Azio kaj kreskas raraj plantoj.

En la naturparkoj de Ĉinio vivas kuriozaj animaloj kaj kreskas valoraj plantoj, ekz. en la naturparko de Xishuangbanna aktivadas sovaĝaj elefantoj, gibonoj, lorisoj kaj aliaj raraj bestoj kaj prosperas raraj tropikaj plantoj. Ĝi estas regno de bestoj kaj plantoj.

Ĝis 1982 fondiĝis jam pli ol cent naturparkoj en Ĉinio.



taksataj de pentristoj kaj specialistoj tieaj.

En ekspozicio iu ĉina pentristo admiris: “La kamparanaj pentraĵoj ne estas limigitaj de perspektivo, proporcio kaj koloro. La aŭtoroj havas nenian pedantecon, sed kuraĝe uzis farbojn kaj transfigurojn. Oni povas vidi la plandojn de staranta koko; la dorso de seĝo estas kurba kun pluraj flankoj videblaj; la fundo de ronda vazo estas kvadrata, kio faris impreson de stabileco; en la pentraĵo “Renkontiĝo de Bovpaŝtisto kaj Teknabino” farita laŭ la ĉina popola legendo, oni vidis iliajn larmojn anstataŭ iliajn okulojn. Ĉio ĉi estas vivoplena.”

La kamparanaj belartaj amatoj de Jinshan pentris laŭ sia percepto pri trajtoj de ĉiuj objektoj kaj sia specifa impresoj pri iliaj interrilatoj, tial laŭ sia bezono prezenti la vivon ili ofte komplike kunfandis malsamajn tempojn, malsamajn spacojn, malsamajn rigardojn kaj perceptadojn pri trajtoj de diversaj objektoj. Kaj, kun si kiel la

centro, ili ofte desegnis ankaŭ ĉion ĉirkaŭe de si en unu bildo, el malsamaj vidpunktoj.

La estetika vidpunkto de kamparanoj de Jinshan strikte ligiĝas kun la tradicia popola arto. Shen Xiaomei, kiu havas la aĝon de pli ol kvindek jaroj, pentris la bildon “Koko Bekas Insektion”. La figuro de la koko estas aparte viveca kaj interesa. Ŝi diris: “Kiam mi estis 13-14-jara knabino, mi aĉetis en foiro argilan fajfilon en formo de tre bela koko, kiu restas ankoraŭ en mia memoro, tial mi pentris tian kokon.” Tio pruvis, ke la tradicia popola arto profunde impresas kamparanojn. Kiam Shen Xiaomei ekhavis okazon pentri, ŝi tuj fervore reaperigis en sia unua pentraĵo tiun figuron, kiu konserviĝis en ŝia koro dum dekoj da jaroj. La ĉinaj kamparanoj, kiuj dediĉis jarmilojn al la popola arto, havas grandan interesecon pri estetiko. Ili desegnas objektojn ne per intuicio, sed per ornamento, abstraktado, troigo kaj transfiguro. Ili esprimas sian subjektivan impreson pri la ob-

jektiva mondo per originalaj komponaĵoj, koloro kaj figuro.

La atingoj akiritaj de kamparanoj de Jinshan en pentrado estas nedisigeblaj de la diligenta laboro de Wu Tongzhang, gvidanto de ilia belarta afero. Li devenas de familio de kampara element-lerneja instruisto kaj estis influata de la kamparana belarto jam de sia infaneco. En la aŭtuno de 1948 li sukcesis en la enira ekzameno al la Ŝanhaja Belarta Kolegio kaj komencis sian novan vivon por pentrarto. En 1965 li estis sendita al la Kultura Domo de Jinshan por gvidi belartajn amatojn. “Mi estas kaj gvidanto kaj lernanto de tiuj kamparanoj-pentristoj,” li diris al mi, kiam mi lin intervjuis. Kvankam 49-jara, li havas tute grizajn harojn. Li vivas kaj laboras kune kun kamparanoj-pentristoj kaj verŝas sian tutan energion en sian aferon. Iu belarta eldonejo esperis, ke li laboros en ĝi, sed li ne volis forlasi sian postenon. En la lastaj jaroj liaj verkoj estis malmultaj, sed li troiĝis, kiam li vidis, ke pli ol 3 800 pentraĵoj de kamparanoj

gviditaj de li estis ekspoziciataj en multaj landoj.

Nun la vicaro de belartaj amatoroj de Jinshan nombras pli ol 300 homojn, inkluzive de dekelk-jaraj knaboj kaj 70-80-jaraj maljunuloj, inter kiuj la plejparto estas virinoj.

En la lasta somero mi havis okazon viziti Jinshan kaj renkontiĝis kun kelkaj kamparaninoj-pentristinoj.

La 58-jara Chen Furong estas ordinara vilaĝanino. Antaŭ ne longe okazis en Usono ekspozicio de pentraĵoj de kamparanoj de Jinshan, kaj ŝia verko "Konstruado de Nova Domo" aperis en afiŝo, kio multe interesis loĝantojn de Nov-Jorko. Mi vizitis ŝin en ŝia hejmo kaj vidis ŝian novan verkon "Brodistina Grupo", kiu estas esprimita per maniero originala kaj lerta. Ŝi diris al mi,

ke ŝi eklernis pentradon en 1978. Ŝi lernis la brodarton de sia patrino en la infaneco kaj krome ŝi ĉiam havas grandan intereson pri papertondaĵoj kaj pentraĵoj sur brikaj fornoj, tial ŝi rapide progresis en lernado de pentrado.

Inter la kamparaninoj-pentristinoj troviĝas ankaŭ Cao Jinying kaj Cao Wenxiu, kiuj estas fame konataj same kiel Chen Furong. La samvilaĝanoj nomis la 47-jaran Cao Jinying Lerta Fratino, kiam ŝi estis juna. Ŝi estas fama en la gubernio pro sia eminenta brodarto. En la lastaj jaroj ŝi akiris grandajn sukcesojn en belarto sub la gvido de Wu Tongzhang. Kelkaj el ŝiaj pentraĵoj konserviĝas en la Instituto pri Ĉinstilaj Pentraĵoj. El ili la plej eminentaj estas "Komunuma Fiŝlageto", kiu montras pitoreskajn pejzaĝojn de akvoriĉa regiono

sude de Jangzi-rivero, kaj "Tutlanda Ĝojego", kiu vivece reaperigis festan gajecon. En la pentraĵo "Tutlanda Ĝojego" ŝi saĝe praktikis la brodarton en la pentrado.

Cao Wenxiu estas la unua lernantino de Wu Tongzhang. Ŝi, diplomito de mezlernejo kaj medicina laborantino de la produktataĉmento, estas studema kaj devokonscia en laboro. Multaj virinoj de Jinshan eklernis pentradon dank' al ŝia konsilo. Multaj el ŝiaj pentraĵoj estis ekspoziciataj eksterlande, inter kiuj la "Knabino Kolektanta Drogherbojn" estis laŭdata kiel eminenta verko.

Kamparanoj de Jinshan atingis brilajn sukcesojn dank' al sia amo al la vivo. Ili faras pentraĵojn ne por nura utilismo, sed por prezenti al la rigardantoj sian modestan kaj bonan animon.



Kokoj
de RUAN SIDI



Emeritaj laboristoj kunportis ĉi tien siajn birdojn.



Plezuro



Al kunveno de birdoj

Plezuro de Emeritaj Laboristoj

Fotoj de ZHOU GUANGXI

Nemalmultaj ĉinaj emeritaj laboristoj sin distras per bredado de birdoj. Matene kaj vespere, emeritaj laboristoj de Xuzhou kolektiĝas en bosko, kun birdoj en kaĝo. Ili gaje babilas en bela kantado de la birdoj.



La avo amas kaj la nepinon kaj la birdojn.



Zorga nutrado



Interŝanĝi spertojn
en bredado

Strataj Biciklaj Garaĝoj en Pekino

Fotoj de WANG JIANZHONG

Biciklo estas trafikilo ĝenerale uzata de pekinanoj. Nun Pekino havas 3.9 milionojn da bicikloj. Biciklaj garaĝoj starigitaj flanke de ĉefaj stratoj kaj publikaj lokoj kaj prizorgataj de gardistoj estas tre oportunaj al biciklantoj. Oni postulas nur du cendojn por depono.




Biciklantoj

Bicikla garaĝo flanke de strato





Pago por depono



Depona numer-marko

Bicikla pumpilo ĉe garaĝo
servas al biciklantoj.



Orda deponado

Kiel mi fariĝis volana stelo

de ZHANG AILING

Oni povas malfacile imagi, ke iu neniam uzis rakedon, post 5-6-jara ekzerco gajnis la mondan volanan ĉampionecon. Ĝuste tia estas la ĉina volanistino Zhang Ailing. Kiel ŝi povis atingi la sukceson? Ŝi konvinkiĝis, ke vojo aperas post irado de homoj, kaj ŝi ne timas malfacilojn dum la irado.

— La Red.

Ĉiu havas ĝojindajn aferojn en sia tuta vivo. Ankaŭ mi havas miajn, el kiuj la plej ĝojinda estas, ke mi gajnis la titolon de monda volana ĉampiono de la virina solludo.

Iutage de la somero de 1981 la urbohalo de Santa Clara de Usono pleniĝis de varma kaj streĉa atmosfero. Miloj da okuloj rigardis min kaj la sudkorean volanan stelon Huang Sen Aj, kiuj konkursis por la monda ĉampioneco de la virina volana solludo. Huang Sen Aj, ne alta sed forta, ludis energie. Antaŭe ŝi partoprenis plurajn internaciajn konkursojn kaj venkis veteranajn volanistinojn sinsekve, tial oni nomis ŝin "nova stelo el la Oriento". Mi neniam rivalis kun ŝi kaj pri ŝi mi sciis malmulton.

En la komenco de la konkurso Huang Sen Aj jam montris sin kiel duelanto kaj batis pilkon forte. Vizaĝe al ŝia minaca atako, anstataŭ deprimiĝi, mi foje-refoje kontraŭatakis por elturniĝi el la pasiveco. Sed bedaŭrinde mi perdis la unuan mat-

ĉon pro malpacienco. Tio konsciigis al mi mian malfortajon. Mi devis havi paciencon en la sekvantaj matĉoj. La dua matĉo estis favora al mi, kaj mi venkis

la rivalon. En la tria matĉo niaj poentaroj proksimiĝis de tempo al tempo, sed mi bone montris mian lertecon, venkis ŝin kaj gajnis la oran medalon. Kiam

Zhang Ailing



mi ricevis la premion, mi vidis ridetantajn vizaĝojn kaj aŭdis varmajn aplaŭdojn, kaj larmoj ruliĝis el miaj okuloj.

Post la gratulo mi kvietigis iom post iom kaj rememoris mian pasintajon. Mi naskiĝis en ordinara familio en Ŝanhajo. Mia patro estas ŝtaliŝto kaj mia patrino tajloro. En la infaneco mi estis bruna kaj malgrasa, kaj ofte malsana. En iliaj okuloj mi estis knabineto eĉ ne povanta elteni venteton. Sed mi estis denaske moviĝema, mi tre interesiĝis pri sportoj. Mi ludis ne nur kun knabinoj, sed ankaŭ kun knaboj. Iafoje pro ludemo mi eĉ forgesis reveni hejmen por vespermanĝo, kaj estis riproĉita de miaj gepatroj. Sed iliaj riproĉoj restis vanaj. Poste mia malforta korpo fortikiĝis iom post iom. Tio montris, ke infanludoj ne estas malkonsilindaj. Kiam mi vizitis elementan lernejon, mi ellernis naĝon, tablotenison kaj korbopilkon, kaj ankaŭ faris atletikajn ekzercojn. Foje mi montris al la gepatroj medalon, kiun mi ricevis pro longdistanca kuro, ili ege ĝojis kaj ne plu rigardis min kiel malfortan knabinon.

Antaŭe mi neniam uzis rake-don. Okaze mi eklernis volanludon. Iun tagon de 1972, kiam mi ludis korbopilkon en mia lernejo, instruistino de iu postkursi sporta lernejo rigardis nian ludon kaj baldaŭ direktis sian atenton al mi. Post la ludo ŝi petis min rapide kuri, subite halti kaj salte mantuŝi aeron. Ŝi demandis min ridetante: "Ĉu vi volas ludi volanon?" Mi surpriziĝis. Sed mi pensis, ke ankaŭ volanludo estas sporto, kaj kapjesis. Baldaŭ oni rekomendis min al la Ŝanhaja Postkursi Sporta Lernejo por lernigi al mi tiun sporton.

En Ĉinio cirkulas la popol-diro: "Ĉiu komenco estas malfacila." Kvankam volano estas malpli granda kaj malpli peza ol korbopilko, tamen ne estas facile ĝin ludi, precipe por mi, komentanto. Por bone posedi la ludarton, mi devis monotone ripeti unu saman movon cent aŭ eĉ mil fojojn. Post ĉiu ekzercado mi eltordis fluon da ŝvito el mia vesto kaj sentis trolacon kaj doloron tra la tuta korpo, iafoje eĉ kun larmoj en la okuloj. Sed kiam mi vidis, ke miaj kolegoj ludas ŝvitantaj kaj la trejnisto donas senlacan instruon, mi ruĝiĝis de honto. Por ekzerci miajn gambojn, mi faris movojn de kaŭriĝo kaj stariĝo kun haltero de pli ol 100 kilogramoj sur la ŝultroj. Por grandigi kur-rapidecon, mi kuradis en vesto kun remburajo de 7 kilogramoj. Por esti lerta en paŝado, mi faris pli ol dek grupojn da movoj ĉiuminute. Post malpli ol duonjaro mi jam povis ludi kun veteranaj volanistinoj. En la sama jaro, kiel membro de la Ŝanhaja Delegacio, mi partoprenis la tutlandan konkurson. Kvankam sen granda sukceso, mi estis hardita kaj ekkonis la mondon de la sporto. De tiam mi pli energie trejnis min kaj mia tekniko rapide progresis. En tutlanda geknaba volana konkurso mi gajnis la trian lokon de la virina solludo kaj la ĉampionecon de la virina parludo. En la volana konkurso de la Tria Tutlanda Sportkunveno nia Ŝanhaja Teamo kun mi kiel ĉefa ludistino gajnis la kvinan lokon de la teama konkurso. Miaj kolegoj kaj trejnistoj laŭdis min, miaj gepatroj fieris pri mi. Ankaŭ mi tre ĝojis, sed mi ne forgesis la ĵuron gajni mondan volanan ĉampionecon, kiun mi faris ĉe mia ekludo de volano.

La vojo al venko ne estas ebena. En 1976 mi la unuan fojon vojaĝis eksterlanden por partopreni la Kvaran Azian Volanan Ĉampionecon Konkurson. Malgraŭ ke mi faris seriozan preparon antaŭ la konkurso, mi estis venkita de sud-korea volanistino en la unua matĉo por solludo. Tio ŝiris mian koron. Tiam la teamestro, la trejnisto kaj la kolegoj konsolis kaj kuraĝigis min, ke mi ne deprimiĝu pro la malsukceso. Post tio, direktate de la trejnisto, mi faris penojn por perfektigi mian ludarton kaj plifortigi mian korpon. Tio kaŭzis al mi lacon kaj doloron, tamen mi sentis ĝojon, ĉar mi komprenis, ke oni sukcesas en sia kariero ne pro hazarda bonŝanco, sed pro sia granda penado. Dum ekzercado mi iom post iom formis mian ludstilon ataki rapide kaj forte, iafoje eĉ surprize. En 1978 mi partoprenis la Unuan Mondan Volanan Ĉampionecon Konkurson kaj gajnis la ĉampionecon de la virina solludo kaj kune kun mia koleginino gajnis la ĉampionecon de la virina parludo. Poste mi atingis sinsekvajn bonajn sukcesojn en landaj kaj internaciaj konkursoj. Ekzemple mi gajnis la ĉampionecon de la virina solludo en la Naŭa Tutlanda Sportkunveno en 1982, en la Londona Grandpremia Konkurso en 1981 kaj en la Tut-Britaj Volanaj Ĉampioneckaj Konkursoj en 1982 kaj 1983. Mi ankaŭ kun aliaj membroj de la ĉina teamo gajnis la ĉampionecon de la virina teama konkurso, de la gea parludo kaj de la virina parludo en aziaj kaj mondaj konkursoj. Ĉiufoje, kiam mi akceptis brilan oran medalon aŭ pokalon, mia koro pleniĝis de neesprimebla ĝojo. Mi kore dankas miajn trejnistojn kaj kolegojn, kiuj instruis kaj helpis min.

La administra divido de Ĉinio

de CHEN CHAO

LA 30-a artikolo de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko difinas:

“1. La lando estas dividita en provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj rekte sub la Centra Registaro;

2. Provincoj kaj aŭtonomaj regionoj estas dividitaj en aŭtonomaj subprovincoj aŭ subre-

gionoj, gubernioj, aŭtonomaj gubernioj kaj urboj;


3. Gubernioj kaj aŭtonomaj gubernioj estas dividitaj en ŝjang-oj (administra unuo sub la gubernio — Trad.), nacimultiplimultaj ŝjang-oj kaj urbetoj.

Municipoj rekte sub la Centra Registaro kaj aliaj grandaj urboj estas dividitaj en distriktoj kaj gubernioj. Aŭtonomaj subpro-

vincoj aŭ subregionoj estas dividitaj en gubernioj, aŭtonomaj gubernioj kaj urboj.

Ĉiuj aŭtonomaj regionoj, aŭtonomaj subprovincoj aŭ subregionoj kaj aŭtonomaj gubernioj estas naciaj aŭtonomaj lokoj.”

La supre diritaj difinoj estas principaj reguloj kaj leĝaj bazoj de la nuna administra divido de Ĉinio:



Ĝeneraldire, Ĉinio praktikas organizan sistemon pri administra divido kun tri niveloj: provinco, gubernio kaj ŝjang-o.

La nuna administra divido de Ĉinio estas surtabeligita jene:

Laŭ siaj realaj cirkonstancoj la diversnivelaĵaj administraj unuoj povas establi necesajn instituciojn. Ekz., la provinca registaro povas establi siajn administrajn agentejojn super gubernioj. Laŭ sia tradicia kutimo la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio establis "ajmak-on", paralele kun la subprovinco, kaj "hoŝon" aŭ "aŭtonoman hoŝon", paralele kun la gubernio. Iuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj establis specialajn distriktojn, urbetojn, arbarajn distriktojn kaj industriajn kaj agrikulturajn distriktojn, paralele kun la gubernio.

En la nuna tempo Ĉinio havas 30 provinc-nivelajn administrajn unuojn*. Ili konsistas el tri municipoj: Pekino, Tianjin kaj Ŝanhajo; 22 provincoj: Hebei, Shanxi, Liaoning, Jilin, Heilongjiang, Jiangsu, Anhui, Zhejiang, Jiangxi, Fujian, Taiwan (reunuiĝota al la patrolando), Shandong, Henan, Hubei, Hunan, Guangdong, Sichuan, Guizhou, Yunnan, Shaanxi, Qinghai kaj Gansu; kaj 5 aŭtonomaj regionoj: la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, la Tibeta Aŭtonoma Regiono, la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

"Subprovinco", kiel agentejo de la provinco, administras iujn guberniojn kaj urbojn. En la tuta lando estas 170 subprovincoj, 9 ajmak-oj kaj 1 administra regiono paralelaj kun la subprovinca administra unuo. Krome,

30 aŭtonomaj subprovincoj kaj subregionoj, kie praktikiĝas la nacia regiona aŭtonomeco, kaj la urboj rekte sub la provinco ĉiuj estas administraj unuoj de la subprovinca nivelo. Nun Ĉinio reguligis la organizan sistemon de subprovinco. Iuj provincoj jam nuligis siajn subprovincajn administrajn unuojn kaj la gubernioj estas administrataj de la urboj rekte sub la provinco.

"Gubernio", kiel bazo de la loka ŝtatpotenco, estas duaklasa administra unuo sub la Centra Registaro. Ĉinio havas 2 133 guberni-nivelajn administrajn unuojn, inter kiuj estas 1 998 gubernioj, 69 aŭtonomaj gubernioj, 54 hoŝoj, 3 aŭtonomaj hoŝoj, 4 specialaj distriktoj, 3 industriaj kaj agrikulturaj distriktoj, 1 arbara distrikto kaj 1 urbeto paralela kun la gubernio.

"Popola komunumo" estis triaklasa, t.e. baza administra unuo. La nova konstitucio difinas, ke ŝjang-o servas kiel baza regpotenca unuo kaj la komunumo kiel administra unuo de la kolektiva ekonomio. Tial, en la estonteco aperos periodo de transiro de komunumo al ŝjang-o. En la tuta lando estas pli ol 50 000 popolaj komunumoj. Pro iom-post-ioma reduktiĝo de ĝia administra amplekso eble plimultiĝos nombro de la regpotencaj unuoj post la fino de tiu transiro.

"Urbo" estas administra unuo de la loĝantaroj de diversspecaj

urboj. La ŝtato difinas la kondiĉojn por establi urbon. Ĝenerale, grandega urbo estas rekte sub la Centra Registaro, paralele kun la provinco; granda aŭ mezgranda urbo estas rekte sub la provinco, paralele kun la subprovinco; kaj mezgranda aŭ malgranda urbo estas rekte sub la subprovinco, paralele kun la gubernio. Nun en Ĉinio troviĝas 109 urboj rekte sub la provinco kaj 133 urboj rekte sub la subprovinco aŭ subregiono. Por simpligi la administran strukturon kaj altigi la efikon de la ekonomia administrado, oni praktikas la formon, ke kompare grandaj urboj gvidas guberniojn. Tio estas la nova trajto de la administra organiza sistemo de Ĉinio.

"Urbeto" estas loĝantara kvartalo en la vasta kamparo, la baza regpotenca unuo paralele kun ŝjang-o. Ĉinio havas 2 664 tiajn urbetojn. Kun la kampara ekonomia disvolviĝo la urbeto certe ludos pli gravan rolon, sekve de tio pligrandiĝas ĝia nombro.

En Ĉinio unu nacimalplimulto sola aŭ almenaŭ du nacimalplimultoj kune praktikas la nacian aŭtonomecon en sia limregiono. La "nacia ŝjang-o" estas baza unuo kun malvasta loko kaj malgranda loĝantaro kaj povas ĝui laŭleĝe rajtojn kaj interesojn konvenajn al la naciaj trajtoj.

* La statistikaj ciferoj en ĉi tiu artikolo estas cititaj el la materialoj publikigitaj antaŭ la fino de 1982.



MONATO

internacia magazino sendependa

Bedaŭrinde ne ekzistas multaj revuoj kia EL POPOLA ĈINIO, kiuj prezentas al vi interesajn artikolojn pri aliaj landoj. Sed ĉu vi jam konas la revuon, kiu raportas ne nur el unu sed el multaj landoj – ne pri la Esperanto-movado tie, sed pri politiko, ekonomio kaj kulturo?



En ĝi – kiel en EPCĈ – raportas indiĝenaj aŭtoroj kaj fakuloj el siaj landoj, ne eksterlandaj korespondantoj senditaj tien de hejmaj redakcioj. Jen vere unika revuo, en kiu vi povas legi ekskluzive en Esperanto verkitajn artikolojn pri ĉiuj temoj de l' hodiaŭa vivo. Apartaj rubrikoj por infanoj, junularo, turismo, kuirado, hobbio, satiro, krucenigmo, novelo ktp. Krome MONATO eldonas ĉiujare unikan poŝkalendaron, en kiu apud kalendaro kun ĉiuj naciaj festoj de l' diversaj landoj vi trovas abunde valorajn informojn tute praktikajn. Petu provekzempleron de MONATO kontraŭ du internaciaj respondkuponoj ĉe la eldonejo TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio.

En la periodo de la Orienta Jin-dinastio

de BA HONG

POST la pereco de la Okcidenta Jin-dinastio, en la norda kaj sudokcidenta partoj de Ĉinio aperis 16 regnoj, kiuj interbatalis senĉese. La granda ĥaoso regis en la baseno de la Flava Rivero, dum la baseno de Jangzi-rivero estis en kvieteco. Tial iuj privilegiaj egbienuloj kaj parto de la popolanoj en la nordo fuĝis suden de Jangzi-rivero. En la jaro 318 p. K. Sima Rui, membro de la imperiestra familio de la Okcidenta Jin-dinastio, surtroniĝis en Jianye (la nuna Nankino), subtenate de la sudaj kaj nordaj egbienuloj. Tial li fariĝis la unua imperiestro de la Orienta Jin-dinastio.

El la nordaj regnoj la regno Antaŭa Qin, fondita de di-nacimulplimulto, kiu loĝis en la provincoj Shaanxi, Gansu kaj Sichuan estis potenca. Sub la gvido de Fu Jian ĝi fundamente unuigis la basenon de la Flava Rivero post pli-ol-20-jara batalo. Fu Jian opiniis sian forton tre potenca kaj ambiciis militiron suden por pereigi la Orientan Jin-dinastion kaj unuigi Ĉinion. Neevitebla fariĝis la milito inter la sudo kaj nordo.

KAMPANJO ĈE FEISHUI-RIVERO

La ĉefaj konsilantoj de Fu Jian ne konsentis pri la atako kontraŭ la Orienta Jin-dinastio, sed Fu Jian fiere diris: "Nun

se miaj militistoj ĵetus siajn rajdvipojn en Jangzi-riveron, ili ja povus bari la fluon kaj tiel frakasiĝus la rezisto de la Orienta Jin-dinastio." Lia reĝimo aspektis potenca, sed efektive havis mortan malfortecon: La vasta han-nacieca popolo ne volis akcepti la regadon de dinacieco, kaj krome inter Fu Jian kaj la gvidantoj de la regataj naciecoj ne mankis kontraŭdiroj.

En la jaro 383 p. K. Fu Jian komandis 800 000 militistojn por ataki la Orientan Jin-dinastion. La lasta sendis komandanton Xie Shi kaj faman generalon Xie Xuan kune komandi 80 000 militistojn por fari reziston. La du armeoj faris formacion ĉe Luojian (la nuna Huaiyuan de Anhui-provinco). Fu Jian sendis Zhu Xu, kapitulacintan generalon de la Orienta Jin-dinastio, al la malamika ĉefkomandejo por persvadi al kapitulaco. Sed Zhu Xu sekrete diris al Xie Shi: "Via malamika armeo estas multnombra, vi devas tuj ataki ĝin, kiam ĝi ankoraŭ ne tute koncentriĝis tie. Se vi fiaskigos ĝian avangardon, vi povos gajni la venkon. Kaj mi helpos vin en Qin-armeo." Xie Shi tuj sendis 5 000 militistojn kaŝe ataki la fronton de Qin-armeo en nokto kaj ekstermis pli ol dekmil malamikajn militistojn. La armeo de la Orienta Jin-dinastio estis kuraĝigita de tio, triumfe marŝis antaŭen kaj atingis la bordon de

Feishui-rivero kaj kontraŭstaris la transriveran armeon de Qin.

Sur la urboturo Shouyang Fu Jian vidis Jin-armeon bonorda kaj disciplina. Prenante la skuiĝon de herboj kaj arboj sur la monto Bagong en vento por moviĝo de Jin-militistoj, li terurigiis.

Post kelkaj tagoj Xie Shi sendis kunporti al Qin-armeo defioleteron por decida batalo, proponante, ke Qin-armeo iom retiriĝu por ke Jin-armeo transiru la riveron fari la decidan batalon. Fu Jian konsentis la proponon kun intenco ataki Jin-armeon, kiam ĝi estos trairanta la riveron.

La diversnaciecaj soldatoj de Qin-armeo plejparte estis perforte varbitaj kaj ne volontis batali por Fu Jian, kaj la han-naciecaj soldatoj des pli ne volis ataki Jin-armeon. Aŭdinte la ordonon de retiriĝo, la trupoj kiel superakvo tra breĉita digo rapide retrokuris. Jin-armeo konkure transpasis la riveron kaj forte atakis la ĥaosan Qin-armeon. Profitante tiun ŝancon, Zhu Xu kriegis malantaŭ Qin-armeo: "Malvenkis Qin-armeo!" Qin-armeo falis en ĥaoson kaj diskuris. Fu Jian fuĝis en tia paniko, ke eĉ ventsusuro kaj gruaĵblekoj terure impresis lin kiel bruoj de persekutantoj el Jin-armeo. Kiam Fu Jian atingis Luoyang, lia armeo nombris nur ĉ. centmil militistojn.

Post tiu kampanjo kolapsis la regado de la Antaŭa Qin. Iuj naciecoj liberiĝis el sub ĝia regado, kaj la norda parto de Ĉinio denove falis en senĉesan bataladon.

POR PETI SUTROJN ĈE LA BUDHISMA LANDO

Budhismo furoris en la periodo de la Orienta Jin-dinastio. Bonzo Faxian (ĉ. 337—422 p. K.) de Posta Qin, malgranda regno en la nordo, decidis viziti la budhisman landon Hindio kun multaj demandoj pri sutroj. En 399 p. K., Faxian, Huijing kaj kelkaj aliaj bonzoj iris de Chang'an al Hindio, tra Xinjiang de Ĉinio kaj Mez-Azio. Ili trapasis varmegajn kaj akvomankajn dezertojn kaj neĝkovritajn montojn. Survoje iuj el la kunirantoj, kiuj ne havis firman volon, retiriĝis kaj Huijing mortis de frosto. Faxian tamen daŭrigis sentime la vojaĝon. Li trapasis pli ol 30 malgrandajn regnojn kaj fine atingis la budhisman sankte-

jon lando Magadha (orienta parto de Hindio) kaj propraokule vidis la originalajn sutrojn.

La sutroj estis skribitaj en sanskrito, Faxian ellernis sanskriton en tri jaroj. Li revenis al Ĉinio per marlinio, kunportante sutrojn kaj ikonojn de budho. Li unue atingis la leonan landon (la nuna Srilankao), tie akiris iujn aliajn sutrojn kaj poste ŝipe veturis al sia hejmlando. Surmare lin plurfoje trafis danĝeroj kaj fine li atingis Laoshan de Shandong-duoninsulo de Ĉinio. Lia vojaĝo daŭris 14 jarojn. Reveninte hejmlanden li ĉinigus multajn sutrojn kaj verkis "Pri la Budhisma Lando", kiu rakontis liajn travivaĵojn en tiu ĉi vojaĝo. La libro estas grava verko eĉ hodiaŭ por studi la antikvan historion de Hindio.

UTOPIO EN VERKO DE TAO YUANMING

En tiu periodo ankaŭ la ĉina literaturo kaj arto atingis relative grandan sukceson.

Tao Yuanming (ĉ. 365—427 p. K.) estis granda poeto de tiu periodo. Li naskiĝis en dekadeca familio bienula. Li abomenis la putran burokratan regadon kaj forlasis registaran oficon en la aĝo de 41 jaroj kaj modeste ekvivis sian ermitan vivon en kamparo. Li verkis multajn idiliojn en sinceraj sentimentoj kaj intimaj lingvaĵoj, kiuj prikantis la belecon de la naturo. Li persone faris terkulturadon, tial liaj verkoj montris modestajn volon kaj sentojn de la popolo.

Lia fama verko "Vilaĝo de Persikfloroj" estis bela eseo en stilo de rakonto. Ĝi rakontas: Foje iu fiŝisto de Wuling (en la nuna Hunan-provinco) boate veturis kontraŭ la fluo de rivereto kun abundaj persikfloroj sur ambaŭbordoj kaj fine atingis montan enirejon. Kiam li eniris la enirejon, frapis liajn okulojn vasta kamparo. Tie la pejzaĝo estis bela, la tero fekunda, la loĝdomoj bonordaj, la medio kvieta, la vojoj interkruciĝantaj, aŭdeblis kokerikoj kaj bojoj,

Kampanjo ĉe Feishui-rivero (383 p.K.)

de REN MENGXIONG



la geviroj portis vestojn samajn kiel tiuj de alilokaj homoj.

Tie ĉiuj laboris diligente kaj ripozis sufiĉe. Ili ne havis reĝon nek donis imposton. Vidinte la fiŝiston, la gastamaj vilaĝanoj regalis lin per bongustaj manĝaĵoj. En interparolo la fiŝisto informiĝis, ke iliaj prapatroj venis tien en la tria jarcento a. K. por eviti militon. Ili ne sciis kiom da dinastioj jam forpasis en la ekstera mondo. Hejmenirante la fiŝisto faris signojn laŭ la vojo, sed kiam li denove provis trovi la lokon, li malsukcesis. La rakonto montris la deziron de la tiam laboranta popolo pri socio sen batalo, trompo kaj ekspluatado. La eseo koncentre montris lian utopian idealon kaj fariĝis fama verko cirkulanta inter la ĉinoj dum pli ol mil jaroj.

DU ARTAJ MAJSTROJ

Gu Kaizhi (ĉ. 345—406 p. K.) estis pentristo lerta en pentrado de homfiguroj. Kiam li estis ĉ.

20-jara, oni planis konstrui templon en Jiangning (la nuna Nankino), la bonzoj petis mondonacon de la tieaj oficistoj, el kiuj neniu volis doni pli ol 100 000 monerojn, sed Gu Kaizhi senhezite konsentis doni milionon da moneroj. Oni senescepte dubis, ĉu li povos doni tiel multe da mono. Post kelkaj tagoj la bonzoj iris al li por peti la konsentitan monon. Gu Kaizhi afable proponis, ke ili kalku muron en la templo, post tio li sin fermis en ĝi pli ol unu monaton kaj pentris sur la muro portreton de Vimalakirti (persono en budhisma rakonto). Kiam li estis finanta la freskon kaj preta pentri la okulojn, li venigis la bonzojn, dirante, ke ili lasu vizitantojn rigardi ĝin kun jenaj kondiĉoj: en la unua tago ĉiu el la vizitantoj devas pagi 100 000 monerojn, en la dua tago 50 000 monerojn kaj en la tria tago kiom da moneroj laŭplaĉe. Kiam la templa pordo estis malfermita, la brilokolora fresko ravis ĉiujn rigar-

dantojn. La vizitantoj estis tiel multnombraj, ke eĉ la templa pordo estis ŝtopita. La bonzoj tre baldaŭ ricevis milionon da moneroj. Tio montris kiel rava estis la pentrarto de Gu Kaizhi siatempe!

Kopioj de la famaj pentraĵoj “Bildo de Eminentaj Virinoj en la Historio” kaj “Diino de Luorivero” de Gu Kaizhi, faritaj de posteuloj, estis konservataj ĝis nun. Bedaŭrinde la “Bildo de Eminentaj Virinoj en la Historio” estis forrabita en 1900, kiam la ok-landa alianca armeo invadis Pekinon, kaj nun ĝi estas konservata en la Brita Muzeo de Londono.

Tiam alia fama artisto estis Wang Xizhi (321—379 p. K.), unu el la plej elstaraj kaligrafoj en la ĉina historio. Li asimilis la kaligrafian arton de Handinastio kaj tiun de la sekva periodo kaj formis apartan stilon en sia kaligrafio. Li estis honorita de posteuloj kiel kaligrafa sanktulo kaj havis grandan influon al la ĉina kaligrafio.

Legendo diris, ke li tre ekŝatis skribi ideografiaĵojn en la aĝo de sep jaroj. En la libertempo kaj eĉ dum irado li pripensis vortostrukturon kaj skribmanieron, kaj fingre skribis sur siaj vestoj. La vestoj difektiĝis de tio post longa tempo. Ĉiutage post ekzercado pri skribado, li iris al la lageto antaŭ sia domo por lavi siajn penikojn kaj frotplaton.



Wang Xizhi
(321-379 p.K.)

de WU SHOUSONG

TIU ĈI MATERIALO ESTAS TRE UTILA

Komence de la kuranta jaro mi ekabonis El Popola Ĉinio kaj ĝin ricevis perpoŝte. Sed por la 2-a numero mi estas tre dankema al vi, ĉar en ĝi mi trovis kvar artikolojn pri mezlerneja eduk-sistemo en Ĉinio. Por mi, mezlerneja instruisto, tiu ĉi materialo estas tre utila kaj plivastigas la horizonton de la diversaj mondaj eduk-sistemoj per la ekzemplo de Ĉinio. Hieraŭ mi montris la numeron de EPĈ al s-ro direktoro de nia lernejo, kaj li konsentis, ke mi prezentu al miaj gekolegoj ĉi tiun materialon. Komence de marto mi prelegos pri eduk-sistemo kaj ĝenerale pri la


edukado de geknaboj en Ĉinio helpe de via ĵurnalo. Mi informos al vi la rezulton de tiu ĉi prelego.

de S. Smigielski (Pollando)

FOTOJ PRI MJAŬOJ KAJ ĈINAJ MALJUNULOJ ESTAS SUKCESAJ

Mi ricevis vian EPĈ 7/82 kun la plej bona, laŭ mi, kovrila bildo, kiu atingas altan nivelon de la arto. Beleco en kombino kun riĉa enhavo! Tre plaĉas la bildoj pri tiuj mjaŭoj kiuj vivas en beleco kaj trinkado. La vestaĵoj de la virinoj (apud rivereto) igas pensi pri Japanio, dum la vizaĝo kaj kaptuko de la maljuna metiisto igas pensi, iel, pri Indonezio. Mi nun opinias, ke la mjaŭoj eĉ en Ĉinio estas rigardataj kiel romantika popolo.

La fotoj pri la gemaljunuloj en via lando estas sukcesaj. Kaj teksto kaj bildoj bone kunlaboras por ke



ni, la legantoj, ricevu ĝustan impreson. En multaj landoj tio estas "malfacila" temo por revuo, sed via laboro funkcias pozitive.

La artikolo pri Cai Yuanpei malkaŝis por ni la kialon de la ĉina partopreno en la "nova" Esperantomovado. Tiu artikolo montras la vojon: La esperantistoj devas pli atenti la gejunulojn kiuj studas en

Kun tempodaŭro nigriĝis la lagakvo.

Eĉ tiam, kiam Wang Xizhi vivis, liaj skribaĵoj jam estis malfacile akireblaj. Iu taoisto de Shanyin (la nuna Shaoxing de Zhejiang-provinco) tre ŝatis la kaligrafiaĵojn de Wang Xizhi. Informiĝinte, ke Wang tre ŝatas anserojn, li do bredis blankajn anserojn. La anseroj estis grasaj kaj amindaj. Iutage Wang Xizhi ilin vidis kaj volis aĉeti. La taoisto tamen diris: "Tiel bonajn anserojn mi ne volas vendi. Sed mi povas donaci al vi ilin ĉiujn, kondiĉe, ke vi skribu por nia templo 'Daodejing' (la ĉefa sankta libro de taoismo)." Wang Xizhi senhezite konsentis, baldaŭ finskribis la libron kaj forportis la amindajn anserojn.

Wang Xizhi amis anserojn pro tio, ke li ofte imitis la naĝmo-

vojn de anseraj palmopiedoj por hardi sian pojnjon kaj lertigi la kaligrafan arton.

PRIMITIVA KEMIISTO GE HONG

Ge Hong estis alkemiisto kaj medicinisto de Jin-dinastio. Lia ĉefa verko "Baopuzi" estis adorata de taoistoj kiel taoisma sankta libro kaj ankaŭ li estis adorata kiel feo.

En alkemiado la ercoj ŝanĝiĝis sub alta temperaturo kaj alta premo en novajn kemiajn komponaĵojn, el kiuj iuj estis rigardataj de antikvaj homoj kiel senmortigaj piloloj. Nemalmultaj el la monarkoj de Ĉinio kredis sen-distinge tiajn pilolojn por longa vivo. La verko "Baopuzi" rakontas ĉefe pri la scioj pri alkemio. Kvankam oni neniel povis akiri verajn senmortigajn pilo-

lojn per alkemio, tamen oni konis la ecojn de iuj ercoj en alkemia procedo kaj akiris iujn primitivajn sciojn pri kemio. Lia verko rakontis, ke cinabro varmigita povas produkti hidrargon, dum hidrargo kaj sulfuro povas kombiniĝi en cinabron; kupro kaj fero sub certa kondiĉo povas anstataŭigi unu la alian.

Alia verko de Ge Hong estas "Surtablaj Receptoj", en kiu estas multaj efikaj receptoj kolektitaj de li. Tiuj receptoj estis bonvenaj. En la libro troviĝas notoj pri tuberkulozo, variolo, cucugamuŝio kaj aliaj kontaĝaj malsanoj. Tiutempe ne mankis homoj, kiuj opiniis, ke epidemioj estas kaŭzitaj de diabloj kaj dioj. Sed Ge Hong opiniis, ke ili estas kaŭzitaj de eksteraj medioj. Kiel trafa estis lia opinio antaŭ pli ol 1 500 jaroj.

universitatoj kaj venas el landoj de la Tria Mondo. Ja tie, en tiuj universitatoj, kuŝas semoj kvazaŭ mustardosemoj! Cai Yuanpei pruvus tion.

de **J. van der Hoeven** (Nederlando)

DONI AL LA REVUO TONON PLI INTIMAN

Jam de longe mi pripensas vian nemalofte ripetatan peton al ni legantoj, pri plibonigo de la revuo EPĈ. Konsiderante vian konsilon, ke kritikoj pli utilas ol laŭdoj, mi do prenis uzitan koverton kaj skribis "kritikendaj aspektoj de EPĈ". Kun kraĵono ŝvebanta super la papero, kiel peniko de kaligrafato atendanta inspiron antaŭ ol ekdesegni belan verkon, mi serioze cerbumis pri la problemo. Post longa tempo mi fine agis — mi elstrekis la supre skribitajn vortojn, ĉar mi honeste povas trovi nenion kritikindan en via elstara revuo. Kompreneble, ne ĉiuj artikoloj egale kaptas la atenton, ĉar ni ĉiuj havas proprajn interesojn. Ekonomiko, industriaj kaj teknologiaj temoj ĝenerale ne interesas min, tamen tiujn mi ĉiam legas. Nur artikolojn pri viando kaj besto-buĉado mi preterlasas pro tio, ke mi estas vegetarano. La koloraj fotoj ĉiam plaĉas al mi, precipe tiuj pri nacimalplimulto, pejzaĝoj kaj antikvaj artaĵoj. Ankaŭ la jenaj rubrikoj tre interesas min: "Tra Ĉinio", "En la Regionoj de Nacimalplimulto", "Vidindaj Lokoj", "5000 Jaroj de Ĉinio" kaj "Mia Vivo". Antaŭe mi opiniis, ke la historio de la Esperanto-movado ne estas vere leginda temo, sed EPĈ persvadis min ŝanĝi la opinion. Tre kortuŝaj estis la rakontoj pri Eltunko, Verda Majo kaj la aliaj kuraĝaj kaj noblaj homoj, kiuj inspiras nin ĉiujn.

Mi pardonpetas, ke neniam antaŭe mi respondis al viaj senditaj demandoj. Tiaj demandoj, kiaj "Kiu artikoloj kaj koloraj bildoj plej interesas vin?" estas ege malfacile respondeblaj, ĉar preskaŭ ĉio estas interesa.

Mi ofte demandas min, kiel la rubriko "Inter Ni" ne ĉiumonate aperas. Vi sendube ricevas multajn korespondadojn, kaj mia opinio la publikigo de pli da eliraĵoj donus al la revuo tonon pli intiman, eĉ familian.

En ĉi tiu jaro mi esperas, ke oni havos la plezuron legi artikolo(j)n de samideanino Tan Xiuzhu, kies modesta stilo tre impresis. Estas ĉiam interese informiĝi pri la grandaj penoj, kiujn faras viaj samlandanoj por lerni la internacian lingvon. Multaj esperantistoj en la landoj, kie Esperanto ne estas lingvo tiel fremda, devus honti pro sia neserioza sinteno kompare kun tiu de ĉinoj kaj iuj aliaj.

de **Hugh Clapham** (Anglio)

EL POPOLA ĈINIO ESTAS BELEGA

Ne nur mi kaj mia edzino, sed ĉiuj personoj kiuj rigardas "El Popola Ĉinio", kaj esp-istoj kaj nesep-istoj, akordiĝas por diri, ke ĝi estas belega. Ĉiam mi havas ekz. en mia teko por montri, ke ne nur mi uzas Esperanton. En la elsendejo de nia loka radio mi ĝin deponas regule. Eble neniu ĝin legas, sed certe ĉiuj ĝin trafolumas.

de **Louis Enizan** (Francio)

MIA IMPRESO PRI "ESPERANTO KAJ LA TRIA MONDO"

Mi skribas al vi unufoje, por esprimi mian impreson pri la artikolo "Esperanto kaj la Tria Mondo" (en la maja numero de EPĈ/82). Mia irana amikino Shirin Ahmad-Nia informis min pri tiu artikolo kaj proponas, ke ĉiuj esprimu sian tutan aprobon al tiu aserto. Ŝi diras: En Esperanto malabundas la libroj kiuj temas pri scienco kaj tekniko, dum la triamondanoj nun arde postulas ilin. Ĝis nun Esperanto ankoraŭ ne povas respondi al tiuj postuloj, kvankam respondi al la postulado signifas tre oportunan raran ŝancon por

disvastigi Esperanton en la Tria Mondo. Se Esperanto, kiu kostas pli malkare por mastri ĝin al ĉiuj ol iu ajn nacia lingvo, plenumos la postulon al Esperanta eldonado, multaj en la Tria Mondo eklernos kaj subtenos Esperanton. Kaj, Esperanto gajnos nekompareblan potencon en si fare de ilia subtenado. La artikolo ĝuste trafas tiujn faktojn kaj cirkonstancojn de Esperanto kaj la Tria Mondo. Por efektiviĝi arde atendatan eldonadon de libroj de scienco kaj tekniko, ŝi kaj ŝiaj kolegoj proponas al geamikoj tutmondaj subtenadon al la artikolo kaj EPĈ kiu aperigas ĝin.

Mi pensas, ke la ebleco de Esperanto estas ne nur en la transportado de sekaj scioj inter alilingvanoj, ankaŭ en interkomunikado pri aliaj diversaj kampoj. Tamen, min konvinkas ŝia aserto kiu staras sur la reala cirkonstanco. Mi konsentas kun ŝi. Mi esprimas mian aprobon al la artikolo kaj EPĈ. Mi esperas daŭran agadon de EPĈ laŭ la principo de "Esperanto kaj la Tria Mondo" kaj en la teoria movado kaj en efektiva eldonado.

Mi, malforta nura civitano en Japanio, almenaŭ povas apelacii pri la fakto al JEI aŭ KLEG (ĉefaj organizoj en nia lando), kiuj multe eldonas esperantaĵojn. Se eblas, mi proponos al volontuloj pli konkretan projekton.

Se Ĉinio kaj Japanio povus stimuli reciproke en la eldonado de scienca kaj teknika libroj, tio estas tre interesa kaj ĝojplena, kvankam la vojo estas malfacila.

de **Nisikawa Sirosi** (Japanio)

IOM PLI DA HUMORAĴOJ

Ĉar mi abonis vian belan monatan revuon "El Popola Ĉinio", mi volas unue gratuli vin pro ĝiaj interesplena enhavo kaj belegaj fotoj. Tamen mi dezirus, ke vi metu en ĝin pli da humoraĵoj kaj kelke da ludoj, ekz. krucvortoj . . .

de **Jean Thiebaud** (Francio)

ĴUS APERIS LA DUA ELDONO DE LA KOLORA INFANLIBRO

KONSTRUI NOVAN PONTON

Ligna ponto rompiĝis pro torento. Kvar intimaj amikoj, sciureto, leporeto, ĉimpanzo kaj elefanto, volis konstrui novan ponton, sed ruza vulpo malhelpis ilin per trompo kaj minaco. Ĉu ili sukcesis aŭ ne? Legu la belan libreton!

ELDONITA DE LA ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

164 × 186mm. 40 paĝoj kun 37 koloraj bildoj

Numero: 88-Es-156p Prezo: £0,22 US \$ 0,40



Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Peranto de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj
(GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Simon Bolívar (1783-1830)

DUAN ZHIQI:

LA STANDARDO DE NACIA SENDEPENDECO KAJ LIBERIGO DE SUD-AMERIKO

*—Memore al la 200-a datreveno
de la naskiĝo de Simon Bolívar*

LA 24-a julio ĉi-jare estas la 200-a datreveno de la naskiĝo de Simon Bolívar, la nacia heroo kaj liberiganto de Latin-Ameriko. Lia patrujo Venezuelo kaj ĉiuj aliaj andaj landoj solenos tiun datrevenon. Venezuelo jam difinis la jaron 1983 “Jaro de Bolívar”. Ankaŭ en Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio, oni kunvenos por memorigi pri tiu granda batalanto, kiu faris elstaran kontribuon al la progresema afero de la homaro.

Mi plurfoje vizitis la loĝejojn de Bolívar en Peruo kaj la ĉefurbo de Venezuelo kaj estis profunde kortuŝita de lia granda personeco. Mi legis librojn eldonitajn de iuj landoj de Sud-Ameriko pri la vivo de Bolívar. Por la nacia sendependeco kaj liberiĝo li faris 472 batalojn en Venezuelo, Kolombio, Ekvadoro, Bolivio, Peruo kaj Panamio. Ne estas strange, ke la statuoj de Bolívar staras sur stratoj, placoj aŭ en parkoj de multaj landoj de Sud-Ameriko. Tio plene montras la profundan amon de la vasta popolo de Sud-Ameriko al tiu heroo.

Simon Bolívar naskiĝis en nobela familio de hispana blankulo

en Karakaso, la ĉefurbo de Venezuelo, la 24-an de julio 1783. En sia infaneco li perdis siajn gepatrojn, kaj lin vivtenis liaj onklo kaj aliaj parencoj. Sed por li la plej kara estis lia vartistino. Ŝi estis afrika negrino-sklavino aĉetita per 300 pesoĵ. Ŝi havis bonan kaj noblan koron. Ŝi ne nur donis al Bolívar patrinan amon, sed pli grave komprenigis al li pri riĉeco kaj malriĉeco, nobleco kaj malnobleco, justeco kaj maljusteco kaj pri la tragedia sorto de sklavoj. Ĉio ĉi tio profunde influis lian ideologion dum la tuta vivo. En la aĝo de 15 jaroj li forlasis sian patrujon kaj dufoje vojaĝis al Madrido, Parizo, Romo kaj aliaj urboj de Eŭropo por studi. Post la granda revolucio leviĝis gravaj sociaj reformoj en Francio. En Parizo li multe infektiĝis de libereco, egaleco kaj homamo. Tio plifirmigis lian decidon sendependigi kaj liberigi la kontinenton de Ameriko. Poste, li konatiĝis en Romo kun Francisco de Miranda, la pioniro de la venezuela movado por sendependeco kaj partoprenis en la de li fondita Granda Unio de Ameriko. En la 18-a de majo 1805, Bolívar ĵuris en Romo: “Mi senlace batos la mal-

amikon kaj mia koro restos maltrankvila, ĝis kiam la kateno de la hispana regpotenco super ni estos disrompita.”

Du jarojn poste Bolívar revenis al sia patrujo Venezuelo. Lia loĝejo en Karakaso fariĝis centro de la patriotaj junuloj. Dank’ al klopodoj de Bolívar kaj aliaj revoluciuloj fondiĝis la “Revolucia Plenuma Komitato” en Karakaso je la 19-a de aprilo 1810. Tiam parto de la homoj strebis nur al la ekonomia reformo kaj aŭtonomeco, sed Bolívar opiniis, ke Venezuelo povas akiri veran sendependecon kaj liberecon, kondiĉe ke oni enterigos la kolonian reĝimon per armitaj fortoj. La ideo de Bolívar ricevis aprobon kaj subtenon de la vasta patriotaro. En la 5-a de julio 1811 estis proklamita la sendependiĝo de Venezuelo, kaj tiel naskiĝis la Unua Venezuelana Respubliko.

Malpli ol unu jaron post sia fondiĝo, la respubliko estis atakata de la hispana armeo, kaj samtempe al ĝi okazis forta tertremo. Kaj pro tio abortis la juna respubliko. Francisco de Miranda, la ĉefkomandanto de la respubliko kaj intima kunba-

talanto de Bolivar, estis arestita kaj mortigita en hispana malliberejo.

La 29-jara Bolivar ne deprimiĝis de tio. Li daŭre mobilizis kaj organizis la popolon al la batalo por la sendependeco de la patrujo. Post malfacila vojaĝo li venis al Kartageno (en Kolombio) jam liberigita el sub la regado de Hispanio kaj tie refondis armeon. Li kun la armeo sub sia komandado ekspediciis orienten, liberigis Karakason kaj fondis la Duan Venezuelan Respublikon. En la 14-a de aŭgusto 1813 la ĉefurba parlamento de Venezuelo elektis Bolivar kiel la patriotan prezidanton kaj ŝtatestron kaj honoris lin per la titolo "liberiganto".

La hispanaj koloniistoj neniel toleris la ekziston de la juna respubliko kaj sendis sian armeon ataki Karakason en 1814, tiel ke la Dua Respubliko denove dronis en sanga maro. Kun la juro batali ĝis la morto, Bolivar forlasis sian patrujojn kaj venis al Jamaiko kaj Haitio por organizi armeon. En tiu tempo li resumis la sperton kaj lecionojn el la pasintaj bataloj, analizis la kontinentan situacion kaj ellaboris novan batalan programon. Ĝuste en tiu periodo naskiĝis la fame konata "Jamaika Deklaracio". La deklaracio eĉ nun havas gravan signifon por la batalo de la Latin-amerika popolo.

En la 1-a de januaro 1817 Bolivar gvidis sian armeon por ekspedicio. Subtenate de la malfronta insurekcia armeo, li fondis la Trian Venezuelan Respublikon en Angostura kaj estis elektita kiel prezidanto de la respubliko. Poste la urbo Angostura estis nomata Bolivar por honori la fondinton de la respubliko.

Bolivar reorganizis sian armeon en Angostura kaj firmigis la malfrontajn bazlokojn. En la 27-a de februaro 1819 la armeo komandata de li komencis militiri okcidenten. En la 7-a de aŭgusto la armeo ekstermis la ĉefajn fortojn de la malamiko ĉe Boyaca kaj eniris la urbon Bogoto la 10-an de aŭgusto. En la 17-a de decembro fondiĝis la Granda Kolombia Respubliko kaj Bolivar funkciis kiel ĝia prezidanto. En la 24-a de junio 1821 Bolivar kun sia armeo faris viv-mortan batalon kontraŭ la hispana kolonia armeo ĉe Carabobo kaj ekstermis pli ol 5 000 soldatojn de la malamiko, tiel ke Karakaso revenis en la manojn de la patriota armeo en la 29-a de junio kaj tiam Venezuelo akiris sian veran sendependecon.

En aŭgusto kaj decembro de 1824 la patriota armeo gvidata de Bolivar faris kampanjojn ĉe Junin kaj Ayacucho, kaj tiam jam videblis la aŭroro de liberiĝo de la Sud-amerika Kontinento. En la 25-a de januaro 1825 la supra Peruo sendependiĝis kaj estis nomata "Bolivia Respubliko" por honori Bolivar. Post tio sendependiĝis unu post alia Paragvajo, Argentino, Ĉilio kaj Urugvajo. Tiel finiĝis la pli-ol-300-jara regado de la hispanaj koloniistoj en Latin-Ameriko.

En la 17-a de decembro 1830, la 47-jara Simon Bolivar mortis en sia kampara vilao de Sankta Marta, Kolombio. En sia mallonga vivo li plene montris sian ardan patriotismon kaj demokratian penson. Li opiniis, ke subpremado kaj regado de iu nacio super alia estas la fonto de ĉiuj malbonoj kaj oni povas akiri sian nacian liberecon kaj sendependecon nur tra la vojo renversi la nacian subpremado per armitaj fortoj. Li diris: "Se nur la libe-

reco de la patrujo ne estas plene garantiata, mi ne ingos mian sabron." Li deklaris: "Ameriko estas nia patrujo, la hispanoj estas nia malamiko, kaj nia standardo estas sendependeco kaj libereco."

Bolivar, kiu havis la penson de kontraŭfeŭdismo kaj demokratio, proponis efektiviĝi respublikon, konstitucian regon kaj rajtojn de civitanoj. En la 15-a de februaro 1819, Bolivar emfazis en la parlamento okazinta en Angostura: "La nova reĝimo de Venezuelo devas esti respubliko bazita sur la popolaj rajtoj, kun apartigo de leĝdona instanco kaj registaro, kaj ĝi devas garantii la liberecon de civitanoj, aboli sklavecon kaj nuligi hierarkion." Li faris dekreton pri distribuado de tero al la indianoj kaj nuligo de iliaj imposto kaj servuto.

Antaŭ sia morto Bolivar foje kaj refoje atentigis sian fraton, ke li traktu lian negrino-vartistinon kiel sian patrinon. Li batalis la tutan vivon por la liberiĝo de la multe suferantaj indianoj, negroj kaj sklavoj, kun sincera simpatio al ili.

En multaj militaj jaroj Bolivar profunde konis la gravecon de la popola unuiĝo. En la "Jamaika Deklaracio" li diris: "Mankas al ni la unuiĝo. Kun ĝi ni povas plenumi la aferon de la nacia restariĝo. . . Estas certe, ke la forto forpeli la hispanojn kaj fondi liberan registaron estas la unuiĝo."

Simon Bolivar sindone batalis por la liberiga afero de la Latin-amerika popolo. Lia spirito ĉiam kuraĝigas la Latin-american popolon en ĝia batalo kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemoniismo.

Ĉinio kaj la landoj de Latin-Ameriko apartenas al la Tria

Mondo. En la pasinteco ili suferis pro la agreso kaj subpremado de imperiistoj kaj koloniistoj. Nun ili alfrontas la komunan taskon batali kontraŭ imperiismo kaj hegemoniismo, defendi la mondpacon kaj konstrui sian landon. En la longa historio la

popoloj de Ĉinio kaj la landoj de Latin-Ameriko havis inter si amikajn rilatojn. Frue antaŭ pli ol 100 jaroj Ĉinio jam komencis amikajn kontaktojn kaj starigis diplomaciajn rilatojn kun landoj de Latin-Ameriko. En la lastaj 20 jaroj Ĉinio starigis diploma-

tiajn rilatojn kun 12 landoj de Latin-Ameriko kaj ankaŭ faris komercan kaj kulturen interŝanĝon kun aliaj landoj en tiu kontinento. La ĉina kaj Latin-amerika popoloj certe plifortigos sian unuigon kaj kunlaboron en la estonto.

YAN WENJING:

DU FABLOJ

Kutimo

Iutage porko venas al sia bona amiko maljuna ĉevalo kaj pretas tranokti en lia stalo.

Noktiĝas. Estas tempo por dormi. La porko sin ŝovas en furaĝamason kaj tie kuŝas komferte. Sed post longa tempo la porko trovas ke la ĉevalo ankoraŭ staras senmove. La porko demandas, kial li ankoraŭ ne endormiĝis. "Mi ĉiam dormas starante," respondas la ĉevalo. La porko mire diras:

"Ĉu eblas dormi starante! Estas tute ne komferte."

"Vi porko kutimas vivi komferte, dum mi ĉevalo kutimas galopi, tial mi ĉiam pretas kuregi eĉ en dormado," respondas la ĉevalo.

Fino de la Eĥo

Se estiĝas sono en la valo, ĝin do tuj respondas la eĥo. Kiom da sonoj, tiom da eĥoj.

La eĥo estas tre obstina kaj fiera. Ĝi opinias sin pli laŭta ol la sono, kiu ĝin estigas. Iutage ĝi proponis al la sono konkurson pri kapablo fari kaj paroli.

"Ni devas konkuri pri kreivo," diras la sono.

"Ni devas konkuri pri kreivo," tuj sekvas la eĥo.

"Sed vi povoscias nur ripeti alies vortojn," diras la sono.

"Mi ne plu disputas kun vi!"

"Mi ne plu disputas kun vi!" koleras ankaŭ la eĥo.

La sono detenas sin de ekscitiĝo kaj silentas.

La eĥo estas volinta ion ripeti. Ho ve! Ĉi-foje ĝi povas eldiri nenion.

Se la sono silentos por ĉiam, la eĥo do neniel povos daŭrigi la konkurson kaj pretendi pri sia supereco, kaj tiel ĝi ne ekzistos plu en la mondo. Tio ja estos la fino de la eĥo.



"Kiel ĉevalo, mi kutimas galopi. . ."
de CHANG TIEJUN

La Geedziĝa Palaco en Ulan-Batoro

En Ulan-Batoro, la ĉefurbo de la Popola Respubliko de Mongolio, troviĝas originala konstruaĵo — Geedziĝa Palaco, konstruita por forigi malnovajn morojn kaj simpligi geedziĝan procedon.

La palaco estas konstruaĵo tri-etaĝa. La unua etaĝo servas kiel ripozejo por novgeedzoj, la dua kiel salono por geedziĝa ceremonio kaj la tria kiel geedziĝa registrejo kaj oficejo. Oni faras geedziĝan registron kaj okazigas geedziĝan ceremonion en mardo, ĵaŭdo kaj sabato. En ĉiu el tiuj tri tagoj dekoj da paroj da gejunuloj partoprenas tie en la publika geedziĝa ceremonio.

En la palaco estas metitaj pafarko, hakilo kaj sonorilo el metalo. Mongola legendo diras, ke la pafarko simbolas, ke infano naskota de novgeedzoj estos saĝa kaj feliĉa; la hakilo simbolas, ke la infano havos fortikan korpon; kaj la sonorilo simbolas, ke la infano estos talenta, kiam li estos plenkreska. La tuta servo en la palaco estas senpaga, sed la geedziĝa bankedo estas pagenda.

Poemokonkurso en Kolombio

La popola poemokonkurso populariĝas en Kolombio. La plej grandskala estas poemokonkurso en la urbo Manizales, unu el la ŝatataj programeroj en la komerca foiro okazigata ĉiujare.

La poemokonkurso estas ŝatata de la kamparanoj de Kolombio por esprimi iliajn sentojn, tial la par-



Poemokonkurso en Kolombio

de ZHU ZHONGYING

toprenantoj en la konkurso estas elektitaj el la kamparo. La konkurso iras sub la libera ĉielo. Ni prenas la konkurson en Manizales kiel ekzemplon. Kutime oni starigas platformon sur Bolivar-placo en la urbo. Dum konkursado du partoprenantoj improvize deklamas sian poemon unu post alia. Laŭ la regularo partoprenantoj devas deklami per tono milda kaj laŭta. Kiam la unua finas sian deklamadon, la alia devas deklami la sian konforme al la rimoj kaj titolo de lia poemo. La temoj de poemoj estas plenkomplesaj, kaj iuj el ili eĉ koncernas politikon kaj gravan socian problemon. Laŭ la poema kvalito la juĝanto decidas, kiu venkas en la konkurso. La venkintoj de diversaj lokoj povas partopreni en la tutlanda konkurso.

de la Sudorienta Azio kaj aliaj partoj de la mondo. Tie troviĝas la unua noktobirda ekspoziciejo, kiu aparte interesas turistojn.

Pro la vasta aplikado de moderna prilumo, tage en la noktobirda ekspoziciejo regas plena mallumo, brilas la artefaritaj steloj kaj klara luno. Tiam la noktaj birdoj komencas sian aktivadon: Najtingaloj kantas, kaprimulgoj flugas, strigoj serĉas por si nutraĵojn . . . Tie oni ne nur aŭdas kriojn de diversspecaj noktaj birdoj, sed ankaŭ vidas, kiel ili vivas. Tiu ĉi ekspoziciejo multe helpas al tiuj studentoj, kiuj okupiĝas pri studado de biologio kaj zoologio.

Ekspoziciejo de noktaj birdoj en Singapuro

En la birda parko de Singapuro estas bredataj diversspecaj birdoj



Finigo de mia vojaĝo

de LI PING

15. nov. LA SUDA LAGO DE JIAXING

Ekirinte de la urbocentro de Jiaxing, mi veturis al la Suda Lago post duon-hora piedirado. Mi staris sur la bordo por atendi pramon. Nebulo dense kovris la lagon, kaj neklare videblis la domo Yanyulou sur la insuleto.

La Suda Lago estas unu el la tri famaj lagoj de Zhejiang-provinco. Ĝin trafluas la Granda Kanalo. De la deka jarcento ĝi jam estas konata kiel pitoreskejo. Post la deksepa jarcento, kun la disvolviĝo de turismo aperis ŝipoj en tiu loko destinitaj por plezurveturo. Tia ŝipo havas plaĉan kaj antikvan formon kun kuirejo kaj dormĉambro taŭgaj por uzo de familio. La Unua Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio okazis ĝuste en tia ŝipo.

En julio de 1921, la Unua Kongreso de KPC sekrete okazis en Sanhajo kaj poste, pro persekuto de policianoj, translokiĝis al la Suda Lago por ĝin daŭrigi en iu plezurŝipo. En la kongreso 13 reprezentantoj, inkluzive de Maŭ Zedong kaj Dong Biwu, la eksvicprezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, pasigis la programon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj rezolucion pri disvolvo de la laborista movado, elektis gvidantaron de la partio kaj deklaris

la naskiĝon de KPC. De tiam la lago fariĝis grava revolucia loko en la ĉina moderna historio. En 1959 oni faris la domon Yanyulou la Revolucia Memoralo de la Suda Lago.

En la lago troviĝas du insuletoj, unu kun la templo por memorigi pri la kreinto de la ĉinaj ideografioj kaj la alia kun la domo Yanyulou.

La domo Yanyulou konstruiĝis en 940 p. K. ĉe la bordo de la lago. En 1548, kiam oni dragis la kanalon, oni metis la elprenitan teraĵon en la lagon kaj formis per tio insuleton. La sekvan jaron oni translokis la domon sur la insuleton kaj plantis antaŭ ĝi du ginkojn. Post pli ol 400 jaroj la arboj restas ankoraŭ prosperaj.

Post multaj jaroj Yanyulou fariĝis iom post iom ĝardeno kun tipa ĉina stilo. En ĝi artisme aranĝitaj estis pavilonoj, longa koridoro, artefaritaj montetoj kaj florbedoj. En la suda fino de la insulo estas lotuslageto ĉirkaŭita de longa digo interligita per arka ponteto. Kiam mi venis tien, jam estis malfrua aŭtuno, velkis la lotusfolioj kaj iliaj tigoj.

Iu ĝardenisto diris al mi, ke la trapo de la Suda Lago estas tre fama pro la maldika ŝelo kaj delikata karno.



Longjing-teo estas unu el la famaj produktaĵoj de Hangzhou. Jen en teĝardeno.

VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO (7)

16. nov. HANGZHOU — LA
SUDA FINO DE LA
GRANDA KANALO

Frue antaŭ 700 jaroj Marko Polo nomis Hangzhou, en sia «La Vojaĝoj de Marko Polo», «la plej bela kaj pompa urbo en la mondo». Tiu pitoreska urbo estas la ĉefurbo de Zhejiang-provinco kaj ankaŭ unu el la ses grandaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio.

Hangzhou sin trovas ĉe la norda bordo de la malsupra parto de la rivero Qiantang. Geologoj konstatis, ke antikve tie estis golfo, kaj la montoj Baoshi norde kaj Wushan sude de la urbo estis origine du kaboj de la golfo. Poste pro puŝo de tajdo kaj sedimentado de sablo, la golfo interne de la kaboj apartiĝis de la maro kaj formiĝis la nuna Okcidenta Lago, kaj la buŝo de la antaŭa golfo fariĝis tero de la nuna urbo Hangzhou.

Hangzhou havas historion de pli ol 2 200 jaroj. Du dinastioj prenis ĝin kiel sian ĉefurbon, precipe ĝi servis kiel la ĉefurbo de la Suda Song-dinastio (1127-1279) dum pli ol 150 jaroj. En tiu periodo ĉinaj nordanoj grandkvante transloĝiĝis suden, tiel ke la nombro de la loĝantoj de Hangzhou rapide kreskis al 1.2 milionoj, kaj la urbo fariĝis ĝia politika, ekonomia kaj kultura centro.

Oni ŝuldis la prosperecon de Hangzhou unue al la foso de la Granda Kanalo. En 610 p. K. la imperiestro Yangdi de Sui-dinastio ordonis rekonstrui la Grandan Kanalon sude de Jangzi surbaze de la malnovaj kanaloj de Qin-dinastio, tio akcelis la dis-

volviĝon de la ekonomio kaj kulturo de Hangzhou. En historia libro estas priskribo pri la prospereco de la urbo: La loko estas abunda je riveroj kaj lagoj kaj riĉa je teraj kaj maraj produktaĵoj, ĝi altiras al si komercistojn el diversaj lokoj.

Hangzhou meritas la nomon de pitoreska urbo. La vasta Okcidenta Lago estas ĉirkaŭita de montoj en tri flankoj. Laŭ statistiko la pitoreskejoj de la lago havas areon de 49 kvadrataj kilometroj kaj la parkoj kaj gazonoj 267 hektarojn. La loko abundas je historiaj objektoj, ekzemple la templo Lingyin konstruita en 326 p. K., la pagodo Liuhe konstruita en 970 p. K., statuoj kaj epitafoj faritaj en la 10-13-aj jarcentoj, la tombo de la nacia heroo Yue Fei kaj kortega biblioteko konstruita en Qing-dinastio, en kiu konserviĝas «Si Ku Quan Shu» (titolo de la kompleta kolekto de ĉinaj libroj el kvar ĉefaj kategorioj kompilita dum Qing-dinastio).

Ĉiufoje, kiam mi venis al Hangzhou, mi respektplene vizitis la tombon de Yue Fei. Yue Fei estis fama generalo de la Suda Song-dinastio (1127-1279). En la batalo kontraŭ la invado de fremda nacio li kun siaj soldatoj faris grandajn meritojn. Ĝuste kiam li akiris venkojn unu post alia, la imperiestro revokis lin laŭ la volo de la kapitulacintoj en la kortego kun Qin Hui kiel la ĉefo kaj sekrete mortigis lin en Hangzhou en 1142. Dum la pasintaj pli ol 800 jaroj la ĉina popolo ĉiam karmemoris lin. Lia tombo konstruiĝis en la jaro 1221 ĉe la bordo de la Okcidenta Lago. Meze de la tombovojo prosperas maljunaj cipresoj kaj ambaŭflanke de ĝi estas ŝtonaj hundoj, ŝafoj kaj ĉevaloj. Ambaŭflanke antaŭ la tombo



La Granda Kanalo ĉe
Hangzhou

VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO (7)

genuas kvar feraj statuoj de Qin Hui kaj aliaj murdistoj.

En vespera krepusko la Okcidenta Lago aspektis pli bele. Mi promenis sur la longa digo kaj sentis kvietecon kaj agrablecon en la koro.

17. nov. GONGCHEN-PONTO

Ĝi estas la lasta ponto en la suda fino de la Granda Kanalo en la norda antaŭurbo de Hangzhou. Starante sur la pontokapo oni povas vidi plensarĝitajn barĝojn en la kanalo, kiuj aŭdigas de tempo al tempo sirenadon, kaj fabrikdomojn starantajn unu post alia. Tie jam fariĝis nova industria distrikto. Mia akompananto, kiu laboras en apuda fabriko, diris al mi, ke antaŭe tie estis dezerto neniam frekventata de turistoj. Nun tie konstruiĝis la Linoteksa Fabriko de Zhejiang, la plej granda en Azio, kaj la Silka Prestinktura Kombinato de Hangzhou, la plej granda en Ĉinio.

Mi vizitis la Silkan Prestinkaturan Kombinaton de Hangzhou. Ĝi havas 5 000 laboristojn kaj oficistojn kaj okupas areon de 310 000 kvadrataj metroj, el kiuj 110 000 estas plankareo. Ĝia krudsilka laborejo ĉiujare produktas 280 tunojn da kruda silko, inter kiuj granda parto estas eksportata al Japanio, Italio kaj aliaj landoj. Ĝia silkoteksa laborejo ĉiujare produktas 7.8 milionojn da metroj da silkoteksaĵoj, inter kiuj altkvalitaj specoj ĝuas grandan famon en la internacia merkato.

Antaŭ mil jaroj la silko de Hangzhou jam famiĝis tra la mondo. "La Vojaĝoj de Marko Polo" diris, ke la silko de Hangzhou ĝuas renomon en Eŭropo. La silko de Hangzhou estas ne nur bonkvalita, sed ankaŭ multspeca. Inter la silko la brokaĵo estas la plej sukcesa kreaĵo de la ĉinaj antikvaj silklaboristoj en utiligo de natura brilo de silko. Unu nova speco de brokaĵo kun diversaj belaj desegnoj estas teksita el 10-20 varpoj, inter kiuj oni intermetas oran, palruĝan, malhele verdan, bluan kaj alikolorajn veftojn. La brokaĵo "Stellumo" havas belan brilon, kiu aspektas kvazaŭ arĝenta rivero. Ankaŭ la brokaĵo Guxiang kun desegnoj de birdoj, bestoj, floroj kaj homfiguroj ĝuas bonan akcepton. Estas ne strange, ke fremdlandaj amikoj nomas la silkon de Hangzhou "floro de la orienta arto".

Kiam mi eliris el la fabriko, jam vesperiĝis. Subite mian nazon frapis acidaodoro. Mia akompananto diris al mi, ke malpura akvo ellasita de la

fabrikoj en la kanalon kaŭzis seriozan polucion kaj preskaŭ neniigis tieajn fiŝojn. Estas videble, ke la loko alfrontas la problemon de serioza polucio alportita de la disvolviĝo de industrio. Mia amiko diris, ke la urba magistrato de Hangzhou jam metis tiun problemon sur la tagordon.


18. nov. ĜIS REVIDO, LA GRANDA KANALO

Finiĝis mia vojaĝo.

Foliumante la mapon kaj mian taglibron pri la vojaĝo mi sentis kaj emocion kaj malplenecon en la koro: Kiel malmulte mi sciis pri la longa Granda Kanalo, pri ĝia pasinteco kaj hodiaŭo, pri la vivo, kutimoj kaj moroj de la popolanoj ĉe ambaŭ ĝiaj bordoj! Tian senton mi havis iam post aprecado de bela muzikaĵo. Ju pli mi remaĉis ĝin, des pli mi sentis ĝin riĉa kaj min mem malmultescia, kaj sekve vekigis forta deziro refoje ĝin ĝui.


La Granda Kanalo, mi certe revenos por vin vidi!

MAPO DE LA GRANDA KANALO DE ĈINIO



Ŝanĝiĝo ĉe la Ponto Gongchen

Fotoj de REN SHIYIN




La ponto Gongchen



La lasta doko ĉe la suda
fino de la Granda Kanalo





Panoramo de Hangzhou, kie
la Granda Kanalo enfluas
en la riveron Qiantang


Foto de **GUO MOSHUI**



La ĉarma Okcidenta Lago

Foto de **MA LIQUN**

La Silka Pres-tinktura Kombinato de
Hangzhou apud la Granda Kanalo






Matena foiro



Apudponta avenuo



MODEŝTAJ KAJ DENŝKOLORAJ PENTRAĴOJ DE KAMPARANOJ DE JINŝHAN

Kamparanoj de Jinshan-gubernio sudokcidente de Ŝanhajo ŝatas pentri en postlaboraj horoj. Ili asimilis nutraĵon de la kolorriĉa tradicia popola arto kaj kreis sian artan stilon kun romantika imago, modesta desegno, striktaj komponaĵoj, densaj kaj klaraj koloroj. Ĉi tie ni prezentas kelkajn verkojn lastatempe faritajn de kamparanoj de tiu gubernio.



Ardeoj

de LI CUIYING

Spinado kaj Teksado

de SHEN XIAOMEI





Fişado

de CHEN MUYUN





Kolomboj en bambuaro

de ZHU SUZHEN

Kajtoj

de ZHANG XINYING





世界语·中国报道·一九八三年第七期(本刊代号:二——九一五)北京市期刊登记证第692号

